

# Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

104-a jaro • n-ro 1253 (12) • **Decembro 2011**

## La 97-a UK en Hanojo: Kongresa komuniko 1



**Hanojo:**      **Esperanta**      **Nova erao**      **Dokumenta**  
**UK en 2012**    **libromerkato**    **en TEJO**      **Esperanto-Centro**

## Esperanto

Oficiala organo de

### Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

**Redaktoro:** Stano Marček.

**Adreso de la redakcio:**

Revuo Esperanto  
p/a Stano Marček, Zvolenská 15  
SK-036 01 Martin, Slovakio  
☎ +421 43 4222 788  
✉ [revuo.esperanto@gmail.com](mailto:revuo.esperanto@gmail.com);  
[redakcio@gmail.com](mailto:redakcio@gmail.com)

**Aperas:**

en ĉiu monato krom aŭgusto.

**Redaktofino:**

la 10-a de la antaŭa monato.

**Legata** en 120 landoj.

**Voĉlegata** por vidhandikapitoj.

**Abonprezo:** varias laŭlande (EUR 38);  
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.  
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

**Anonctarifoj** (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,  
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.  
Movada rabato 50%.  
Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas  
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

**Bankokontoj:** 378964 ĉe ING-bank,  
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam  
(IBAN: NL72INGB0000378964  
BIC: INGB NL2A)  
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,  
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam  
(IBAN: NL66ABNA0426051599  
BIC: ABNA NL2A).

**Kreditkartoj:**



**Adreso de la Centra Oficejo de UEA:**  
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ  
Rotterdam, Nederlando  
☎ +31-10-436-1044,  
✉ +31-10-436-1751, ✉ [uea@co.uea.org](mailto:uea@co.uea.org)  
TTT: [www.uea.org](http://www.uea.org)

**Ĝenerala Direktoro:** Osmo Buller.

## Enhavo

- 243 ... Malferme: UEA kaj TEJO aktivaj ĉe UN kaj Unesko (Osmo Buller)
- 244 ... Kongresa komuniko 1
- 245 ... Nia intervjuo: Demandoj al mi mem (Audrys Antanaitis)
- 246 ... Esperanta libromarkato 2001-2010 (Osmo Buller)
- 248 ... Nova erao en la gvidorganoj de TEJO (Sergej-Meir Tyrin)
- 249 ... Leterkesto: Kio estas 'decido' de la Komitato? (Johan Derks);  
Komento de la Ĝenerala Sekretario (Barbara Pietrzak)
- 250 ... Esperantigo de propraj nomoj (Hannes Larsson)
- 251 ... Nova grupo ĉe la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ekzamenoj  
pri instruista trejnado; Dua Interlingvistika Simpozio (Ilona Koutny)
- 252 ... Irlanda Ministro pri EU-aferoj malfermos la EEU-Kongreson  
(Seán Ó Riain)
- 253 ... Ĉu la nepoj nin benos? (Paweł Fischer-Kotowski)
- 254 ... Recenzoj: Andreas Künzli pri *Legendoj pri SEJM*
- 255 ... Rob Keetlaer pri *Proverbaro tutmonda*
- 256 ... Konatiĝu kun Dokumenta Esperanto-Centro (Davor Grgat)
- 257 ... Laste aperis
- 258 ... Esperanto en prestiĝa libro (io)
- 259 ... Oficiala informilo; Forpaso; Aldone al la novembra Kalendaro;  
Kongresu kvintage en Edinburgo
- 260 ... Esperanto denove en Ekonomia Forumo (Jozef Reinvar kaj Peter Baláz);  
La 11-a de septembro en Adelajdo (Katja Steele)
- 261 ... Jarfina Indekso

**KOVRILPAGE:** La 97-a UK okazos en du lokoj: en la Kultura Palaco de Hanojo (Solena Inaŭguro, Nacia Vespero, teatra kaj koncerta vesperoj); la ceteraj programeroj en la kongresejo de la hotelo Meliã Hanoi (sur la bildo). Legu pli sur la p. 244.

## Estraro de Universala Esperanto-Asocio

**Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado):** Prof. Probal Dasgupta, LRU,  
Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road,  
IN-700108 Kolkata, Barato;  
☎ +91 33 2484 8529;  
✉ [probal53@yahoo.com](mailto:probal53@yahoo.com).

**Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado):** S-ino Claude Nourmont,  
2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim,  
Luksemburgo; ☎ +352 23 66 88 64;  
✉ [moonmont@pt.lu](mailto:moonmont@pt.lu).

**Ĝenerala Sekretario (informado):**  
S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Między-  
narodowa 38/40a m 217, PL-03-922  
Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79 21  
[h], ☎ +48 6000 51 425;  
✉ [bpietrzak@onet.eu](mailto:bpietrzak@onet.eu).

**Financo, administrado, TEJO:** S-ino  
Loes Demmendaal, Duikerlaan 160,

NL-2903 AC Capelle aan den IJssel,  
Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20;  
✉ [l.a.demmendaal@planet.nl](mailto:l.a.demmendaal@planet.nl).

**Landa kaj regiona agado:** S-ino Maritza  
Gutiérrez Gonzáles, Avellaneda 212, e/  
Gertrudis y Josefina, CU-10500 Habana,  
Kubo; ☎ (of) +53 7 6489201, (h) +53 7  
6498729; ✉ [mgglez@enet.cu](mailto:mgglez@enet.cu).

**Scienca kaj faka agado:** Prof. Amri  
Wandel, 767 Makabim, IL-71799 Modiin,  
Israelo; ☎ +972 544 548712; ✉ [amri@huji.ac.il](mailto:amri@huji.ac.il).

**Eksteraj rilatoj:** S-ro Stefano Keller,  
Case postale 6034, CH-1002 Lausanne,  
Svislando; ☎ +41 76 261 06 09;  
✉ [kellerstefano@gmail.com](mailto:kellerstefano@gmail.com).

**Observanto de TEJO:** Nico Huurman.  
**Observanto de ILEI:**  
S-ro Stefan MacGill.



## UEA kaj TEJO aktivaj ĉe UN kaj Unesko

**U**nu el la lastatempaj pozitivaj evoluoj en UEA estas la reaktiviĝo de la agado ĉe UN kaj Unesko. Kun ambaŭ UEA havas oficialajn rilatojn tiel longe, ke ili ŝajnas memkompreneblaj. Tiel tamen ne estas, sed ilia pludaŭro postulas, ke UEA regule ĉeestu en iliaj aranĝoj kaj per sia propra agado kontribuu al iliaj agadoj kaj celoj. Al UEA la rajto ĉeesti en iliaj forumoj donas la eblon aŭdigi nian voĉon pri Esperanto kaj lingvaj rajtoj. Jen kaj jen ni atingas ankaŭ konkretajn sukcesojn, ekz. en la UN-konferenco en Bonn (sube), kaj niaj aktivuloj ricevas prestiĝajn funkciojn, kiel d-ro Hans Michael Maitzen, kiu gvidas la packomitaton de Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j) ĉe la Viena oficejo de UN.

### NRO-konferenco

De la 3-a ĝis la 5-a de septembro la Departemento pri Publika Informado de UN okazigis en Bonn sian 64-an Konferencon de NRO-j. Partoprenis estrarano Stefano Keller kun Marcos Cramer, Mélanie Maradan, Julia Noe kaj Manfred Westermayer. Tuj komence ili esprimis malkontenton, ke nur la angla estas laborlingvo. Al la demando pri la kialo, Keller ricevis la respondon, ke temas pri manko de mono. Dum diskuto pri civitana partopreno, Maradan demandis, kiel oni imagas, ke ekz. delegitoj de indiĝenaj popoloj povus partopreni en la diskuto, se oni uzas nur la anglan. Ŝi rimarkigis, ke ĝuste la koncernatoj ne povas interveni pro nesufiĉa kono de la angla. Ŝi ne ricevis respondon.

Ankaŭ la proponoj de UEA pri la fina deklaro ŝajnis renkonti ignoron. UEA proponis aldoni frazojn pri lingva diverseco kaj lingvaj rajtoj, pri kiuj la tekstoprojekto silentis. La lastan tagon aperis nova versio, en kiu la mencioj plu mankis. Post protesto de UEA oni komisiis laborgrupon finredakti la deklaron post la konferenco. Je ĉies surprizo ĝi akceptis ĉiujn proponojn de UEA al la fina deklaro. "Neniam mi vidis tiom da mencioj pri lingvo, lingvaj rajtoj kaj diverseco en UN-dokumento", komentis Keller. Eĉ du novaj alineoj estis aldonitaj laŭ propono de UEA. La plej grava estas jena rekomendo al "Rio + 20", Konferenco de UN pri Daŭripova Evoluo en Rio-de-Ĵaneiro junio 2012:

"Ni alvokas por respekto al kaj inkludigo de etnaj lingvoj en la eduka sistemo, ĉar tiaj lingvoj entenas la kompleksecon de siaj respektivaj medioj, kaj ankaŭ por konsidero de la potencialo de neŭtrala internacia lingvo kombinanta klarecon kaj facilecon de lernado kun sia neŭtraleco, kaj tiel povanta esti rigardata kiel esence daŭripova."

Laŭ iniciato de UEA la deklaro rekonas, ke biodiverseco kaj lingva diverseco estas nedisigeblaj, kaj alarmas pri la perdo de tradiciaj scioj pro la perdo de lingva diverseco. Ĝi alvokas la ŝtatojn por lingva politiko, kiu atentus la bezonojn de la nuna kaj estontaj generacioj, kaj plurloke mencias la gravecon de lingva

politiko por daŭripova evoluo kaj la valoron de kultura, lingva kaj etna diverseco.

Kvankam la deklaro ne reprezentas oficialan sintenon de UN, ĝi aperos en la dokumentaro de UN kaj havas valoron kiel morala premo de la civila socio al UN. La konferenco direktis ĝin precipe al "Rio + 20", en kiu ĉeestos ankaŭ UEA. (UEA jam faris al ĝi proponojn, pri kiuj ni raportos poste.)

### Junulara Forumo de Unesko

De la 17-a ĝis la 20-a de oktobro okazis en Parizo la 7-a Junulara Forumo de Unesko, kies temo estis "Kiel junularo kondukas ŝanĝon". UEA delegis al la Forumo du aktivulojn de TEJO, Veronika Poór kaj Nico Huurman, kiuj vigle partoprenis en ĝiaj diskutoj. Iliaj atentigoj pri la neceso gardi lingvan diversecon kiel esencan parton de kultura diverseco ricevis apogon de pluraj reprezentantoj. Mencion pri tio tamen ne eniris la finan raporton. Ĝi tamen rekomendas al la membroŝtatoj kreskigi la konscion de la junularo pri la bezono konservi la palpeblan kaj nepalpeblan kulture heredaĵon, kaj enhavas plurajn aliajn rekomendojn, kiujn UEA kaj TEJO dividas.

### Ĝenerala Konferenco de Unesko

La 36-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko kunvenis en Parizo de la 25-a de oktobro ĝis la 10-a de novembro. Nome de UEA partoprenis kiel observantoj Renée Triolle, Barbara Despiney kaj François Lo Jacomo. Kvankam voĉdoni rajtis nur ŝtatoj, nia delegacio ne nur observis sed havis utilajn kontaktojn kun delegitoj de ŝtatoj kaj de aliaj NRO-j.

Kulmino estis la plenkunsido dediĉita al la 10-a datreveno de la Universala Deklaracio pri Kultura Diverseco (vd. [www.esperanto-un.org/dokumentoj/unesco-kultura-diverseco.html](http://www.esperanto-un.org/dokumentoj/unesco-kultura-diverseco.html)). La ekstera mondo plej multe atentis la akcepton de Palestino kiel membro de Unesko. Rezulte Usono, la ĉefa financanto, frostigis sian kontribuon, kio devigas Uneskon al drastaj ŝparoj. Pro manko de mono stumblis ekz. la iniciato pri Internacia Jardeko de Interproksimigo de Kulturoj, sed ne la aŭspicioj por la Monda Centro de Lingvoj en Rejkjaviko, la urbo de la UK en 2013.

Por UEA grava estis la aprobo de novaj gvidlinioj pri la rilatoj de Unesko kun NRO-j. Ĝis nun por tiuj rilatoj estis tri kategorioj (asociaj, konsultaj kaj operaciaj), sed estonte nur du, asociaj kaj konsultaj. UEA havis ĝis nun operacian statuson kaj devus kvalifikiĝi por konsulta statuso. Oni ankoraŭ ne anoncis, ĉu Unesko indikos al la NRO-j rekte unu el la du novaj kategorioj aŭ ĉu ĝi procedos kiel en 1996, kiam ankaŭ UEA unue perdis sian antaŭan statuson kaj devis peti reakcepton. Se ni plu same aktivus kiel ĝis nun, ni povos rigardi la estontecon kun fido.

Osmo Buller





## 97-a Universala Kongreso de Esperanto Hanojo, Vjetnamio, 28 julio – 4 aŭgusto 2012

### Konstanta adreso

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.  
Tel.: +31 (0)10 436 1044; fakso: +31 (0)10 436 1751.  
Retadreso: [kongresoj@co.uea.org](mailto:kongresoj@co.uea.org)  
TTT: [http://www.uea.org/kongresoj/uk\\_2012.html](http://www.uea.org/kongresoj/uk_2012.html)

### Kongresa temo

La temo de la 96-a UK estas “Esperanto – ponto al paco, amikeco kaj disvolviĝo”.

### Informoj

La retejo de LKK havas multe da interesaj kaj praktikaj informoj pri Hanojo kaj Vjetnamio. Ĝia adreso: [www.97uk-hanojo.com/index.aspx](http://www.97uk-hanojo.com/index.aspx). Por aliĝoj kaj mendoj servas la ĝenerala kongresa retejo de UEA (vd. supre).

### Kongresejo

La kongreso okazos en du lokoj, ĉ. 8 minutojn piede unu disde la alia. La solena Inaŭguro, Nacia Vespero, teatra kaj koncerta vesperoj, Internacia Arta Vespero kaj Solena Fermo okazos en la Kultura Palaco de Hanojo. La giĉetoj, budoj kaj ceteraj programeroj havos lokon en la kongresejo de hotelo Meliã Hanoi. Ambaŭ troviĝas en la turisma regiono urbocentre.

### Vojaĝado

Hanojo havas rektan flugokonekton kun pluraj urboj en Azio kaj Eŭropo. Kun unu aŭ pli da haltoj ĝi konektiĝas al la tuta mondo pere de diversaj flugkompanioj. Ĝi atingeblas ankaŭ trajne kaj buse.

### Loĝado

Detalaj informoj aperos en la *Dua Bulteno*. La oferto varios de modestaj ĝis luksaj hoteloj kaj loĝejoj, ĉiuj je promena distanco de la kongresejoj kaj kun favoraj prezoj.

### Ekskursoj

La antaŭkongresa ekskurso vizitos la nordon de Vjetnamio. La postkongresa ekskurso iros al la centro kaj sudo de la lando kaj al la fama templo Angkor Wat en Kamboĝo. Priskriboj pri la ekskursoj aperos en la *Dua Bulteno*.

### Internacia Kongresa Universitato

La 64-a IKU akceptos prelegproponojn ĝis 2012-01-31 (vd. novembro, p. 285).

### Infana Kongreseto

Lige kun la 97-a UK okazos la 43-a Internacia Infana Kongreseto. Informoj aperos ĉe: [bertosch.free.fr/iik2012](http://bertosch.free.fr/iik2012).

### Internacia Junulara Kongreso

La 68-a IJK okazos en Tenri, Japanio, de la 5-a ĝis 12-a de aŭgusto 2012. Informoj ĉe: [www.ijk2012.org](http://www.ijk2012.org).

### Reklamiloj

La *Unua Bulteno* estas senpage havebla ĉe UEA, ankaŭ grandkvante. Glumarkoj mendeblas ĉe la Libroservo de UEA. Folio kun 10 markoj kostas € 1,20 (rabato de 1/3 ekde 3 ekz.; aldoniĝas la sendokostoj kaj, en EU, imposto 19%).

### Aliĝilo

Papera aliĝilo estas ricevebla ĉe la perantoj kaj ĉe UEA, kiu volonte liveros ĝin grandkvante por distribuado kun E-gazetoj kaj en E-aranĝoj. Eblas ankaŭ elŝuti ĝin ĉe la kongresa TTT-ejo aŭ uzi la retan aliĝilon tie.

### Kotizoj

Ĝis la 31-a de decembro 2011 validas jenaj kotizoj (interkrampe tiuj por la landoj de tarifo B): Individuaj Membroj de UEA (sed ne MG) € 160,00 (120,00); MG-membro aŭ ne-IM de UEA, € 200,00 (150,00); Komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, IM de UEA, € 80,00 (60,00); Kunulo/junulo/handikapulo, ne-IM de UEA, € 120,00 (90,00). Infanoj kaj junuloj naskiĝintaj post la 31-a de decembro 1991 aliĝas senpage (bv. sendi kopion de identigilo). Pagmanieroj troviĝas en la aliĝilo, Jarlibro 2011 (p.36-37) kaj en la TTT-ejo.

### Statistiko

Ĝis la 15-a de novembro estis registritaj 176 aliĝintoj el 37 landoj.



## Prezidanto de TEĴA Audrys Antanaitis: Demandoj al mi mem

**Radiostaciaj ĵurnalistoj ordinare pridemandas aliajn. Ili malofte parolas mem. Kaj eĉ pli malofte ili parolas kun si mem. Post la ĝenerala kunveno en Kopenhago, dum kiu estis elektita nova Estraro de TEĴA, mi faris kelkajn demandojn al mi mem:**

**Ĉu esperantista ĵurnalistumo\* kaj TEĴA estas la samo?**

Kompreneble, ne! E-ĵurnalistumo estas arbo, TEĴA – estas ties branĉo. Aŭ aŭditorio en la granda E-palaco. Ja ĵurnalista organizaĵo, samkiel kia ajn alia, povas reprezenti nur siajn membrojn. Tial ni, kvankam ni unuigas 115 membrojn el ĉiuj kontinentoj, povas preparoli kaj pripensi nur proprajn aferojn. Alikonsidere, TEĴA estas organizaĵo de esperantistoj-ĵurnalistoj, havanta grandan kaj profundan historion.

**Se TEĴA estas ne hejmo, sed nur ĉambrego en tiu hejmo, kiun sencon ĝi havas?**

Eĉ ununura ĉambro povas estis bela kaj alloga, tia kiun estas agrable eniri por kontakti siajn kolegojn. TEĴA estas la loko kie esperantisto-ĵurnalista, amato aŭ profesiulo, povas trovi areon por sia agado aŭ subtenon al liaj iniciatoj. Kompreneble pli moralan ol fincan. Tamen ankoraŭ mankas strebo kaj emo eluzi ĉi tiun areon. Mi emfazu, ke sukcesa funkciado de TEĴA dependas ne nur de la Estraro, sed de nia tuta membraro.

**Ĉu vi povus prezenti al la legantoj la novan Estraron de TEĴA?**

Volonte! En la kopenhaga membrakunveno estis elektita estraro kun jena konsisto: prezidanto – Audrys Antanaitis, ĝenerala sekretario – Vytautas Šilas (ambaŭ el Litovio), membroj – Stano Marček (Slovakio), Bengt Nordlöf (Svedio), Dieter Rooke (Svislando), Alfred Schubert (Germanio) kaj Dima Ŝevĉenko (Ruslando). El la malnova estraro do restis nur tri: A. Antanaitis, D. Rooke kaj V. Šilas. Por la estrarana seĝo ne plu kandidatiĝis la antaŭaj estraranoj – Mariana Evlogieva (Bulgario), Aleksander Korĵenkov (Ruslando), Kalle Kniivilä (Svedio) kaj Gabriela Kosiarska (Pollando).

Nia moskva kolego D. Ŝevĉenko iĝis ĉefredaktoro de la asocia interreta organo [www.tejha.org](http://www.tejha.org).

**Kio obstaklas al TEĴA por disvolvi la agadon?**

La membroj loĝas en diversaj landoj de la mondo. Kolekti ilin en unu sama aranĝo estas komplete kaj multekoste. Ni eluzas la Universalajn Kongresojn de Esperanto. Tamen dum UK-oj, okazintaj aŭ okazontaj ekster Eŭropo (Havano kaj Hanojo), niaj kunvenoj ne okazis aŭ ne okazos. Due, nia asocio ne plenumas la rolon de profesia sindikato, ĉar ja tiel funkciadas naciaj ĵurnalistaj organizaĵoj. Trie, la esperantista ĵurnalistumo plejparte estas amatora, niaj membroj aŭ ne plenumas profesion ĵurnalistan laboron en sia lando, aŭ laboras en nacia redakcio – tiel por la plejmulto el ili Esperanto restas nur hobbio. La tuto de ĉi tiuj cirkonstancoj decidas, ke ni restas areo, kiu dependas de individuaj iniciatoj, bonvolo de subtenantoj kaj membra aktivado. Tamen, kaj tio tre gravas, ni povas defendi la rajtojn de niaj membroj, se tiuj en iu lando estus rompataj. Feliĉe tio dume ne necesas.

**Kio estas la prezidanto de TEĴA?**

Mi estas profesia filologo, lituanisto kaj ĵurnalista. Mi jam dum dek du jaroj okupiĝas nur pri ĵurnalistumo. En Litovio mi gvidas televido- kaj radio-dissendojn pri politika kaj socia temaro. Nune mi estas gvidanto de radio-dissendoj ĉe la populara litova radio-stacio “Žinių radijas”.

**Ĉu do en Hanojo forestos kunveno de TEĴA-anoj?**

Ho ve, jes! Ĉiuj niaj estraranoj estas eŭropanoj. Mi dubas ke iuj el ili trovos la monon por iri al tiu malproksima lando. Cetere, en Vjetnamio ni havas eĉ ne unu membron! Tamen nia esperantista-ĵurnalista rondo restas aperta por pliaj aliĝoj el kiu ajn lando. La plej proksiman TEĴA-kunvenon ni intencas okazigi en Irlando kadre de la Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en junio 2012.



Partoprenantoj de la  
kopenhaga membrakunveno

\*) ĵurnalista komunumo



# Esperanta libromarkato 2001-2010

## Vojaĝo en Esperanto-lando ĉampiono de la jardeko

**Vojaĝo en Esperanto-lando** de Boris Kolker okupis la unuan lokon en la furorlistoj de la Libroservo de UEA dum pluraj jaroj ekde la apero de ĝia reviziita kaj abunde ilustrita dua eldono en 2002. Ne mirinde, ke kun 3127 ekzempleroj tiu “perfekta kurso de Esperanto kaj gvidlibro pri la Esperanto-kulturo” fariĝis la ĉampiono de la tuta jardeko 2001-2010.

La jaraj furorlistoj de la Libroservo estas longa tradicio en nia revuo. Antaŭ 10 jaroj oni faris la unuan paŝon por komenci ankaŭ tradicion de jardekan furorlistoj, kiam en la julia-aŭgusta numero 2001 aperis listo de 100 plej multe venditaj libroj kaj 20 ne-libroj en la periodo 1989-2000. La unua periodo estis 12-jara por inkluzivi ankaŭ la unuajn du jarojn ekde la komenco (en 1989) de la komputila administrado de la stokoj kaj vendoj de la Libroservo. Survoje al tradicio, jen la listo pri la unua jardeko de tiu ĉi jarmilo.

Same kiel nun, ankaŭ en la listo de 2001 la unuan lokon gajnis lernolibro, *Saluton!* de Audrey Childs-Mee, de kiu dum 12 jaroj vendiĝis 3 233 ekz. Apero de aliaj lerniloj kaj de retaj kursoj duonigis ĝiajn vendojn (1 488 ekz.), sed ĝia nuna tria loko montras, ke ĝi plu estas ŝatata. Sur la dua loko en 2001 estis la adresaro de *Pasporta Servo* de TEJO, kiu konservis ĝin ankaŭ ĉi-foje (resp. 3 138 kaj 2 960 ekz.).

Lerniloj, legolibroj, vortaroj k.a. prilingvaj libroj tute nature estas la ĉefa grupo inter la plej furoraj titoloj. La plej vendita beletraĵo, ne verkita kun lingvoinstrua celo, estas la rakontaro *Patrino koro* de N. Nedelčeva sur la 22-a loko (417 ekz.) – krom se estas fikcia ankaŭ *La libro de la mirindaĵoj* de Marko Polo (20-a kun 427 ekz.). La plej furora ne-prilingva scienca libro estas *La kosmo kaj ni* de D. Galadi-Enríquez kaj A. Wandel (84-a kun 190 ekz.).

Oni atentu, ke temas pri furorlisto de la Libroservo de UEA kaj ne de la tuta Esperanta libromarkato. Por la titoloj eldonitaj de UEA/TEJO (indikataj per \*) la nombroj indikas iliajn totalajn vendojn, sed por la titoloj de aliaj eldonejoj nur tiujn vendojn, kiuj okazis tra UEA. La efektivaj vendokvantoj de ĉi-lastaj estas pli grandaj, ĉar iliaj eldonejoj vendis siajn varojn ankaŭ al aliaj libroservoj kaj individuaj klientoj. Tamen, nuntempe verŝajne tuta duono de la Esperanta libromarkato realiĝas tra UEA. Ankaŭ la nombro de UEA-eldonaĵoj en la jardeka listo kreskis: 38 en 2001; ĉi-foje 51.

La mona vendosumo dum 2001-2010 estis € 1 253 530; dum 1991-2000 ĝi estis € 1 222 850. La sumo do kreskis 2,5%, kvankam malkreskis la ĉefa merkato de la Libroservo, la membraro de UEA. La averaĝa jara nombro de individuaj membroj estis 7280 dum 1991-2010 kaj 5860 dum 2001-2010, t.e. falo de 19,5%. Aliflanke, A. Korĵenkov kalkulis en *La Ondo de Esperanto*, ke la averaĝa prezo de novaj libroj plialtiĝis 38% (de € 8,22 al € 11,40).



Ke la vendosumo de la Libroservo ne falis, nur parte dankindas al pli altaj prezoj. La ĉefa porcio konsistis el eldonaĵoj de UEA, kies prezoj estas regule reduktataj en postaj jaroj. Krome, multaj libroj, ĉu de UEA ĉu de aliaj, estis eldonitaj antaŭ longe – la plej malnovaj du en 1919 – kaj dum la lastaj 20 jaroj iliaj prezoj restis sensanĝaj aŭ maplialtiĝis. Kiel ajn, lastatempe la vendiĝo de libroj ja malkreskas kaj tiu de DVD-oj k.a. ne kompensas tion. Kiel montras la listeto pri diskoj, en konkurso kun libroj nur tri el ili enirus la grandan liston.

**Osmo Buller**

### Libroj

| ekz. | Titolo                                                                  | prezo (€)   |
|------|-------------------------------------------------------------------------|-------------|
| 3127 | <i>Vojaĝo en Esperanto-lando</i> (Boris Kolker)*                        | 18,00       |
| 2960 | <i>Pasporta Servo</i> (listo de gastigantoj de TEJO)*                   | 9,00        |
| 1488 | <i>Saluton!</i> (Audrey Childs-Mee)*                                    | 10,80       |
| 1231 | <i>Gerda malaperis!</i> (Claude Piron)                                  | 6,60        |
| 1137 | <i>Pocket Esperanto Dictionary</i> (A. McLinen)*                        | 15,00       |
| 1049 | <i>Baza Esperanta radikaro</i> (W. F. Pilger)*                          | 7,50        |
| 855  | <i>Konciza etimologia vortaro</i> (André Cherpillod)*                   | 21,60       |
| 777  | <i>Plena ilustrita vortaro de Esperanto</i>                             | 93,00       |
| 765  | <i>Faktoj kaj fantazioj</i> (Marjorie Boulton)*                         | 13,80       |
| 761  | <i>Poŝamiko</i> (B. Allée, K. Kováts)                                   | 5,10        |
| 713  | <i>Mil unuaj vortoj en Esperanto</i> (H. Amery, S. Cartwright)          | 12,00       |
| 643  | <i>Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj</i> (Gosciny, Uderzo)                  | elĉ.        |
| 638  | <i>Praga Manifesto de la movado por la internacia lingvo Esperanto*</i> | 2,10        |
| 613  | <i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA*</i>                               | 4,50        |
| 569  | <i>Lingvo kaj popolo</i> (Humphrey Tonkin)*                             | elĉ.        |
| 545  | <i>Vivo de Zamenhof</i> (Edmond Privat)*                                | 9,00        |
| 515  | <i>La Zamenhof-strato</i> (R. Dobrzyński / L. C. Zaleski-Zamenhof)      | 18,00       |
| 507  | <i>Sed homoj kun homoj</i> (Z. M. Sikosek)*                             | 21,00/15,00 |
| 486  | <i>Vastas la mondo, multas laboro</i> (Kim Woo-Choong)                  | 3,00        |
| 427  | <i>La libro de la mirindaĵoj</i> (Marko Polo)*                          | 15,00       |
| 425  | <i>Esperantaj sinonimoj</i> (Jaan Ojalo)*                               | elĉ.        |
| 417  | <i>Jubileo</i> (Red. Mark Fettes)*                                      | 3,00        |

|     |                                                                                                |       |                                 |                                                                             |                  |
|-----|------------------------------------------------------------------------------------------------|-------|---------------------------------|-----------------------------------------------------------------------------|------------------|
| 417 | <i>Patrina koro</i> (Nedelka Nedelčeva)                                                        | 1,80  | 211                             | <i>Diskutlibro pri malpli uzataj lingvoj</i><br>(J. Bañeres, M. Strubell)*  | 6,00             |
| 410 | <i>Ĉu vi parolas tendare?</i> (R. Corsetti, M. La Torre)*                                      | 4,80  | 210                             | <i>Esperanto kaj internaciaj organizaĵoj</i><br>(Kompilis Lee Chong-Yeong)* | 2,40             |
| 402 | <i>Sankta Biblio, La / Biblio</i>                                                              | 20,10 | 206                             | <i>La Hobito, aŭ tien kaj reen</i> (J. R. R. Tolkien)                       | 18,00            |
| 401 | <i>Nova Esperanta krestomatio</i> (Red. William Auld)*                                         | 12,30 | 201                             | <i>Fundamento de Esperanto</i> (L. L. Zamenhof)                             | 18,00            |
| 394 | <i>Winnie-la-Pu</i> (A. A. Milne)*                                                             | 12,30 | 201                             | <i>Viktimoj</i> (Julio Baghy)                                               | 6,00             |
| 380 | <i>Hejma vortaro</i> (Red. Jouko Lindstedt)*                                                   | elĉ.  | 199                             | <i>Lito apud la fenestro</i> (Betty Salt)*                                  | 4,80             |
| 374 | <i>Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto</i><br>(L. L. Zamenhof)*                      | 12,30 | 198                             | <i>Kiel diri en la kroata...?</i> (S. Cimić)*                               | 1,80             |
| 373 | <i>Manlibro pri instruado de Esperanto</i><br>(Red. Katalin Kovács)                            | 8,70  | 197                             | <i>La ŝtona urbo</i> (Anna Löwenstein)                                      | 22,80            |
| 363 | <i>Dictionnaire de poche / Poŝvortaro</i> (Red. A. Andrieu)                                    | 5,40  | 195                             | <i>La tuta Esperanto</i> (Henrik Seppik)                                    | 7,50             |
| 357 | <i>Tinĉjo en Tibeto</i> (Hergé)                                                                | 11,70 | 194                             | <i>Etimologia vortaro de Esperanto</i> , vol. 5<br>(Ebbe Vilborg)           | 27,00            |
| 349 | <i>Utila Estas Aliĝo</i> (Ulrich Lins)*                                                        | 15,00 | 193                             | <i>Esperanto sen mitoj</i> (Z. M. Sikosek)                                  | elĉ.             |
| 348 | <i>Ĉu nur-angla Eŭropo?</i> (Robert Phillipson)*                                               | 18,00 | 191                             | <i>Esperanta antologio</i> (Red. William Auld)*                             | 12,30            |
| 343 | <i>Asteriks kaj la normanoj</i> (Goscinnny, Uderzo)                                            | elĉ.  | 191                             | <i>Lingvo kaj vivo</i> (Gaston Waringhien)*                                 | 12,30            |
| 332 | <i>Proverbaro esperanta</i> (L. L. Zamenhof)                                                   | 6,00  | 190                             | <i>La kosmo kaj ni</i> (D. Galadí-Enríquez, Amri Wandel)                    | 17,10            |
| 331 | <i>Esperanto per rekta metodo</i> (Stano Marček)                                               | 8,10  | 189                             | <i>Tuj apude</i> (Humphrey Tonkin)*                                         | 6,00             |
| 330 | <i>Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo</i> (Tibor Sekelj)*                                         | 4,80  | 188                             | <i>Metodiko de la Esperanto-instruado</i> (Rudolf Rakuša)                   | 4,80             |
| 324 | <i>Paŝoj al plena posedo</i> (William Auld; eld. Edistudio)                                    | 9,00  | 187                             | <i>Vikipedio – praktika manlibro</i><br>(Red. Yves Nevelsteen)              | 3,00             |
| 321 | <i>La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka</i><br>(Gian Carlo Fighiera)*                                | 2,40  | 186                             | <i>Diccionario Esperanto-Español-Esperanto</i> (Sopena)                     | elĉ.             |
| 320 | <i>Lasu min paroli plu!</i> (Claude Piron)                                                     | 13,20 | 185                             | <i>Kulturo kaj sano</i> (M. Claxton)*                                       | 3,90             |
| 314 | <i>La danĝera lingvo</i> (Ulrich Lins)                                                         | 21,00 | 185                             | <i>Infoduktoj</i> (Luc De Brabandere)*                                      | 2,70             |
| 304 | <i>Vere aŭ fantazie</i> (Claude Piron)                                                         | 16,50 | 184                             | <i>Teach yourself Esperanto</i> (J. Cresswell, J. Hartley)                  | elĉ.             |
| 302 | <i>Lingvistikaj aspektoj de Esperanto</i> (John Wells)*                                        | 5,70  | 183                             | <i>Naturaj vortordoj en Esperanto</i> (Wim Jansen)*                         | 4,50             |
| 298 | <i>Maskerado ĉirkaŭ la morto</i> (T. Soros / T. S. Švarc)*                                     | 15,00 | 183                             | <i>Vocabulário de bolso</i> (E. Monteiro Machado)                           | 2,70             |
| 287 | <i>La Nigra insulo</i> (Hergé)                                                                 | elĉ.  | 181                             | <i>La aboco de tempoplanado</i> (L. J. Seiwert)*                            | 1,50             |
| 272 | <i>Plena manlibro de Esperanta gramatiko</i><br>(B. Wennergren)                                | 30,90 | 177                             | <i>Sur sanga tero</i> (Julio Baghy)                                         | 6,00             |
| 268 | <i>La Komuna Eŭropa Referenckadro*</i>                                                         | 3,00  | 176                             | <i>Ili kaptis Elzan!</i> (Claude Piron)                                     | 13,20            |
| 263 | <i>Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj</i><br>(R. Phillipson)*                    | 2,10  | 176                             | <i>Esprimo de sentoj en Esperanto</i> (Edmond Privat)                       | 6,00             |
| 260 | <i>Kunci Esperanto</i> (H. Goes, B. Mulyadi)*                                                  | 1,20  | 174                             | <i>De vilaĝo al ĉefurbo</i> (Gbeglo Koffi)*                                 | elĉ.             |
| 259 | <i>Eseoj memore al Ivo Lapenna</i> (Red. Carlo Minnaja)                                        | 45,00 | 174                             | <i>Mondo (rakontaro)</i>                                                    | elĉ.             |
| 254 | <i>La arto labori kune</i> (Red. D. Blanke kaj U. Lins)*                                       | 60,00 | 170                             | <i>Karlo</i> (Edmond Privat))                                               | elĉ.             |
| 253 | <i>Monumente pri Esperanto</i> (Hugo Röllinger)*                                               | 7,50  | <b>Kompaktdiskoj kaj DVD-oj</b> |                                                                             |                  |
| 252 | <i>Paĉjo, kio estas rasismo?</i> (T. Ben Jelloun)*                                             | 4,80  |                                 |                                                                             |                  |
| 246 | <i>Esperanto de nivelo al nivelo</i> (Red. M. Kovács)                                          | 10,50 | <b>ekz.</b>                     | <b>Titolo</b>                                                               | <b>prezo (€)</b> |
| 236 | <i>Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj</i><br>(Marjorie Boulton)*                                 | 1,80  | 266                             | <i>Esperanto elektronike</i> (dvd)                                          | 4,50             |
| 235 | <i>Unuigintaj Nacioj: Venu kun mi!</i> (N. Annan)                                              | 7,80  | 194                             | <i>Esperanto-literaturo</i> (kd; Red. Z. M. Sikosek)*                       | 9,90             |
| 227 | <i>Etimologia vortaro de la propraj nomoj</i><br>(André Cherpillod)*                           | 19,50 | 185                             | <i>Kristnaska kordo</i> (kd; Akordo)                                        | 15,00            |
| 227 | <i>La brusela bubo</i> (W. Vandersteen)                                                        | 6,60  | 162                             | <i>Prezidantoj de UEA</i> (kd; Red. Z. M. Sikosek)*                         | 9,90             |
| 225 | <i>La fenomeno Esperanto</i> (William Auld)*                                                   | 5,70  | 146                             | <i>Rejkjaviko 1977</i> (kd; Red. Z. M. Sikosek)*                            | 9,90             |
| 224 | <i>Kio ni estas kaj kion ni celas</i><br>(Red. R. Corsetti, O. Buller)*                        | 4,50  | 127                             | <i>Universalaj Kongresoj</i> (kd; Red. Z. M. Sikosek)*                      | 9,90             |
| 221 | <i>Nederlands-Esperanto-Nederlands Woordenboek</i><br>(P. De Smedt)                            | 17,10 | 125                             | <i>2 paroladoj de Ivo Lapenna I</i> (kd)                                    | 13,80            |
| 221 | <i>Reeĥoj</i> (Jugoslavia poemaro)                                                             | 1,80  | 125                             | <i>Lokomotivo, rulu nun!</i> (kd; Kajto)                                    | 9,90             |
| 220 | <i>Afero de espero</i> (Heidi Goes)*                                                           | 9,00  | 117                             | <i>Lernu!</i> (komputila kd)                                                | elĉ.             |
| 218 | <i>La postdomo</i> (István Ertl)                                                               | 9,00  | 105                             | <i>2 paroladoj de Ivo Lapenna II</i> (kd)                                   | 13,80            |
| 217 | <i>Originala Esperanta bildvortaro</i> (Sylla Chaves)                                          | elĉ.  | 96                              | <i>Kin-Dza-Dza!</i> (dvd; Reĝ. G. Danelija)                                 | 14,40            |
| 216 | <i>La jaro</i> (poŝkalendaro)                                                                  | 5,40  | 95                              | <i>Kajto</i> (kd; Kajto)                                                    | elĉ.             |
| 216 | <i>Interlingvistiko kaj esperantologio: vojoj al</i><br><i>la faka literaturo</i> (D. Blanke)* | elĉ.  | 94                              | <i>Vizito al la Centra Oficejo</i> (dvd)*                                   | 9,00             |
| 213 | <i>Historio de Esperanto</i> (Aleksander Korĵenkov)                                            | 12,00 | 90                              | <i>Bonvenu paco</i> (kd; Kantas T. Ben-Cvi kaj Chantal)                     | 13,50            |
| 211 | <i>La vivo de Henriko Kvina</i> (W. Shakespeare)*                                              | 9,00  | 87                              | <i>Masko</i> (kd; Kajto)                                                    | 13,80            |
|     |                                                                                                |       | 84                              | <i>Amu min</i> (kd; Ĵomart kaj Nataŝa)                                      | 18,00            |
|     |                                                                                                |       | 83                              | <i>Tom Jobim en Esperanto</i> (kd)                                          | 12,60            |
|     |                                                                                                |       | 81                              | <i>JoMo friponas!</i> (kd; Jomo)                                            | 15,60            |
|     |                                                                                                |       | 75                              | <i>Procesio multkolora</i> (kd; Kajto)                                      | 9,90             |
|     |                                                                                                |       | 71                              | <i>Tohuvabohuo</i> (kd; Kajto)                                              | 9,90             |

\* Indikas eldonajn de UEA / TEJO. elĉ. = elĉerpita

# Nova erao en la gvidorganoj de TEJO

## La novelektita estraro de TEJO okazigis sian inaŭguran kunsidon komence de septembro en la Centra Oficejo en Roterdamo.

Tiu ĉi estraro, konsistanta el 8 membroj, tri el kiuj jam oficis en la antaŭa estraro, estis elektita kadre de la ĉi-somera IJK en Ukrainio, kaj ĝi gvidos TEJO-n en la proksimaj du jaroj (2011—2013). Ĝi fizike renkontiĝis por la unua fojo dum la unua semajnfino de septembro por laborplena sesio; kelkaj el la estraranoj pluveturis al Bruselo post la fino de la kunsido por reprezenti TEJO-n en la granda foiro pri volontulado ('Volontula Vilaĝo'), organizita de la Forumo Junulara Eŭropa. Jen la plej gravaj diskutpunktoj kaj decidoj faritaj dum tiu sesio.

### Revuo *Kontakto*

La redaktoro de *Kontakto* Rogener Pavinski entreprenas multajn paŝojn por reklami la refreŝigitan revuon kaj konsciigi la iaman legantaron pri la pluraj plibonigoj okazintaj lastatempe. Okaze de la kunsido li sendis kelkajn proponojn pri tio, kiel informi novajn kaj jamajn legantojn. La estraro do decidis lanĉi abonkampanjon kun premioj. Krome, ekzempleron de *Kontakto*, kiel oficialan revuon de TEJO (interalie pro la rubriko TEJO-Tutmonde, enhavanta movadajn novaĵojn kaj transprenanta la rolon de samnoma organo), ekde nun ricevos ĉiuj landaj sekcioj de TEJO. Laŭidee ĝi povus esti uzata por lokaj varbo-celoj.

### Regularo kaj Reglamentejoj de TEJO

Tiuj ĉi oficialaj difinaj dokumentoj de la organizo jam sufiĉe kadukiĝis kaj bezonis refreŝigon (ekz, ĉu TEJO daŭre bezonas elektran skribmaŝinon en la CO?). Dum la kunveno de la Komitato de TEJO en Kievo okazis tiucela laborgrupo kaj estis prezentita unua malneto de la proponata ŝanĝaro. Kun la helpo de Osmo Buller, la Ĝenerala Direktoro, certaj proponoj – ekzemple mallongigo de oficperiodo al 1 jaro, aldonado de membra kategorio por ideaj subtenantoj (sen kotizo), sumlimo por financaj kontraktoj – dum la estrara kunsido estis pliprecizigitaj kaj ilia senco analizita. Reviziita malneto estis prezentita al la Komitato, kiu nuntempe diskutas ĉiujn proponojn; post reta voĉdono de la komitatanoj, la aprobitan tekston oni prezentos al UEA kaj fine al la Komitato de UEA, kiu aprobu ĝin en sia kunsido en la venonta UK.

### Dungo de oficisto

TEJO jam delonge entreprenas paŝojn por akiro de propra oficisto, kiu salajrate helpas antaŭenigi plurajn agadojn de la organizo (samkiel en UEA, la laboro abundas). Dum la kunsido estis findifinitaj ĉiuj restantaj demandoj pri la laboro de dungito. Endas rimarkigi ke temas pri senprecedenca okazo, ĉar temas pri eksteroficeja laboranto. Sekve estis subskribita la kontrakto kun Manuela Ronco (antaŭa volontulo de TEJO), kiu eklaboris la 3-an de oktobro. Indas gratuli al TEJO, kies plurjaraj streboj finfine efektiviĝis!

### Retpaĝaro de TEJO

La nuntempa retejo iom-post-iom kaosiĝis, ne plu havas optimumam aranĝon, do necesas restrukturi ĝin. Krome, la sisteme laŭdata multlingveco de la retejo estis perdita pro ŝanĝo de la infrastrukturo. Tiun laboron komencis Saša Kovjazina, antaŭa estrarano pri informado, kaj ĝi estos daŭrigata helpe de profesia persono nun serĉata. Aldone al tio, estas sentata manko de unu loko, kie oni povu konsulti ĉiujn aranĝojn okazantajn en la junulara

movado: nune la informoj estas disĵetitaj en la kiberspaco... Gvide de Petra Smidéliusz, estrarano pri landa agado, okazos kunlaboro kun landaj sekcioj de TEJO por helpi al ili aperigi siajn aranĝojn en komuna kalendaro, kiu estos konsultebla ĉe [tejo.org](http://tejo.org) kaj por kiu la infrastrukturon prezentos [esperanto.com](http://esperanto.com).

### Kunlaboro kun ILEI

Unu el la streboj de TEJO estas okazigi IJK-on en Afriko, kaj la celo-jaro por ĝi estas 2014. ILEI proponis okazigon de sia konferenco en 2014 apud la IJK, en iu afrika lando. Diskutante pri tiu ĉi bonvena propono – la apudaj kongreso kaj konferenco en la pasinteco estis tre bona sperto por ambaŭ organizoj – la estraro atentis ankaŭ la temon de trejnado de instruistoj dum junularaj aranĝoj kaj interrete per [edukado.net](http://edukado.net). Oni plutraktos kun ILEI ambaŭ aferojn. Ĉi-kuntekste oni interkonsentis ke TEJO subvenciu rabaton de 15 € al junuloj prenantaj KER-ekzamenon sur la nivelo C1.

### Informado kaj kulturo

La estraranoj preparolis ankaŭ kolektaĵon de filmmaterialoj kaj kvalitataj fotoj el diversaj aranĝoj, por posta uzo informcele; estis decidita interalie fotokonkurso kadre de *Kontakto* (menciindas ke bezono de varba filmo pli kaj pli sentblas pro la tre aktiva agado de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj lastatempe). Aparta paŝo estos refreŝigi la Artistan datumbazon, kreitan sisteme de David-Emil Wickström, kiun povos profiti organizantoj de ĉiusecaj aranĝoj en Esperantujo. Estis preparolita ankaŭ kunlaboro kun Muzaiko – projekto de tuttempa interreta radio Esperantlingva – kaj la estraranoj tuj registris sonan kontribuon por ĝi.

### Pasporta Servo

Post kiam la servo estis plejparte movita al la interreto, tiel ke ĝia administrado estu multe pli facila kaj ĝia uzado estu pli taŭga por la moderna epoko, la projekto daŭre spertis plurajn neatenditajn problemojn, ĉefe teknikajn. La Komitato dum sia somera kunveno analizis la problemojn kaj starigis planon de paŝoj necesaj por plibonigi la (iasence mizeran) situacion. Sekve de tio estis publikigita alvoko aliĝi al la teamo de PS, al kiu venis jam kandidatigoj (legantoj de *Esperanto* estas bonvenaj; plej gravaj taskoj bezonantaj asiston estas libro-kompilado kaj aranĝo de mapoj, ankaŭ grafikisto por modernigi la aspekton de la PS-libro). Laŭplane ĝis la fino de la jaro estos reeblogita la propra regado de personaj profiloj, kio igos la retejon denove plene uzebla. Dume la estraro prezentos tempoplanon kiel evoluigi la servon, kaj la Komitato diskutos kio estu la estonta formo de PS.

### Estrarar laborplano

Nemalgrava eco de prudenta singvido estas starigo de realismaj celoj kaj plenumhorizontoj. Por la proksima jaro la nova estraro jam prezentis sian laborplanon al la Komitato, kaj ĝiaj ĉefpunktoj estas: pli efika kunordigo de la organiza laboro; propraj iniciatoj kaj pli aktiva subteno al konkretaj projektoj en la sfero de kulturo; regula informado far la estraro; porestera informado; pli forta ĉeesto en la Forumo Junulara Eŭropa; konigo de TEJO en aliaj gravaj internaciaj kadroj; komunaj trejnseminarioj kun aliaj organizoj; subteno al ekstereŭropaj landaj sekcioj, kie mankas spertoj.

Resume, ne mankas agado en TEJO! Ĝiaj aktivuloj estas energiplenaj kaj rezultojn oni aŭdu laŭlonge de la jaro.

Sergej-Meir Tyrin







## Kio estas 'decido' de la Komitato ?

**Jam ekde septembro 2009 estas diskutado en la Komitata retdiskutlisto pri la urĝeco enkonduki la eblecon de perinterreta voĉdonado fare de la Komitato de UEA.**

Tiu ĝenerale subtenata deziro kondukis al decido de la Komitato en Havano “ebligi retan voĉdonadon de la Komitato”. Unu jaron poste ankoraŭ nenio el tio estas realigita. Sur la sojlo de la komitata kunveno ĝi produktas cirkuleron en kiu ĝi “post la profunda reanalizo de ĉiuj facetoj de la reta voĉdonado en la Komitato rekonfirmas” kaj tiam sekvas elmencio de pasigendaj proceduraj stumbloj kun la konkludo ke la efektivigado de perinterreta voĉdonado devos atendi plurajn jarojn.

En la tuta traktado de la propono akceptita en Havano la Komitato havis neniun voĉon. En Kopenhago eĉ la temo, kvankam entagordigita, “pro tempomanko” ne estis preparolata. Verŝajne la decido estos efektivigita plej frue fine de 2014. ILEI kaj TEJO bezonis ne pli ol unu jaron por enfunkciigi perretan voĉdonadon.

Oni demandas sin, kiuj internaj fortoj en UEA ludis rolon prokrastante seriozan traktadon. Mankas la spaco al mi por mencii ĉiujn faktorojn, kiujn cetere mi bone konas. Unu el ili mi volas speciale substreki, tio estas la subordigita rolo, kiun ludas la komitatanoj en la (manko je) diskuto.

La statuto estas tre klara pri tio, ke la plej alta organo de la asocio estas la Komitato.

Artikolo 29 preskribas “Al la Komitato apartenas ĉiuj kompetentecoj en la Asocio, kiuj ne estas rezervitaj, laŭ la leĝoj aŭ la Statuto, al aliaj instancoj.” kaj en artikolo 33 estas:

La Estraro estas respondeca al la Komitato. Ĝi

(a) respondecas, sub gvido de la Komitato, pri la ĝenerala evoluigo de la Asocio;

(b) plenumas la decidojn de la Komitato;

Oni bezonas neniun alian tekstlinion por pruvi la superordigon de la Komitato al la Estraro.

Atentu nun la tekston de mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro (ĜD) de UEA en la Komitata retdiskutlisto, je 12-4-'10:

... Pri la ĉiutaga funkciado de UEA respondecas kaj decidas la Estraro, dum la Komitato (Statuto, art. 29.c) “difinas la ĝeneralan agadon de UEA”. La ĝeneralan agadon oni difinas per strategiaj k.a. planoj. ... krom elekti la Estraron k.a. organojn kaj decidi pri financaj dokumentoj, la Komitato estas taskita pri tiel ĝeneralaj demandoj, ke por ili reta voĉdonado ne necesas. ...

La sekvoj estus fatalaj. La Estraro havas tre konkretajn taskojn kaj ĝi ofte devas rapide fari decidojn, pro kio ĝi jam de longe voĉdonas ankaŭ rete.

Prave la ĜD citas artikolmembron 29.c kaj konkludas ke la Estraro respondecas pri la ĉiutaga funkciado de UEA. Tie li tamen prenu 'ĉiutage' laŭ la vorto: rutinaj, ĉiutagaj aferoj.

Li ankaŭ ŝajnas ne kompreni ke la elmencio de ok specialaj taskoj de la Komitato sub artikolo 29 estas farita por certigi ke neniam la Estraro akaparos la diron pri tiuj taskoj.

Kiel ĜD povas publike aserti ke la Komitato estas taskita nur pri ĝeneralaj demandoj, pri kiuj reta voĉdonado ne necesas ?

La demando pri plirajteco de la ĜD (kaj komplementa eventuala malplirajto de la Komitato) havas alian strukturan kaŭzon, nome la rilato inter Estraro kaj CO.

En scienco pri organizadoj ekzistas iuj principoj pri tio, kiuj ne estas plenumitaj ene de UEA:

1. Certigu ke ekzistas bone funkcia 'centra bredejo', interkonsiligaĵo inter prezidanto kaj Direktoro; ĝi estu parte fermita, parte malfermita.
2. Kreu travideblan rilaton inter Estraro kaj Direktoro, fiksus ĝin en Direktorada Statuto kaj apliku ĝin kohere kaj singarde.
3. Elektu formon en kiu Estraro kaj Direktoro kiel malmulte eble enpaŝu la aliulan terenon kaj en kiu la Direktoro havas kiel eble multe da libereco kaj respondeco.

Ĉi-tiu mallonga ekzerco pri organiza sociologio tuŝas nur unu faceton de la ne-povo de la Estraro ageme efektivigi decidojn de la Komitato. Kaj mi ne volas kulpigi pri tio unu personon kiu ĉiam montras plejeble grandan respondecon pri la funkciado de la Centra Oficejo. Alia faceto estas la pasiveco de multaj komitatanoj mem en la historio de UEA kaj (konsekvence ?) la manko je respekto flanke de estraranoj, kiuj mise parolas pri 'rekomendoj' de la Komitato al la Estraro anstataŭ 'decidoj', kiujn la Estraro devas plenumi ene de klare indikita periodo.

**Johan Derks, eks-komitatano**

## Komento de la Ĝenerala Sekretario

Ĉiu iniciato, kies celo estas plibonigi la laboron de UEA kaj de ĝiaj organoj, estas ĉiel bonvena. Tial la malnova estraro de UEA kun atento sekvis i.a. la komitatan opiniinterŝanĝon iniciatitan de Komitatano B Johan Derks pri reta voĉdonado, kiu ekviglis en la antaŭkongresa periodo 2010. La estraro – ekstraktinta samperio de la aŭtoran projekton de la prezidanto Probal Dasgupta pri la Strategia Plano – ekde la komenco havis principe pozitivan sintenon al la ideo.

Malgraŭ tio, ke Johan Derks ne estis reelektita kiel Komitatano B, pri kio informis Gazetara Komunikado de UEA 382 (01.06.2010), la estraro akceptis lian proponon pri reta voĉdonado.

Dum sia lasta – en la malnova konsisto – kunsido en Havano la estraro (2007-2010) decidis pri la establo de dumkongresa Komisiono pri la Strategia Plano. Por ĝiaj laboroj krom la dissendita aŭtoro projekto de la Plano de la prezidanto Dasgupta

estis transdonita la propono de komitatano Mark Fettes pri starigo de la Strategia Komisiono, kaj ankaŭ la propono de eksa komitatano, Johan Derks. La kongresa Komisiono konsideris ilin, sed ne havis la tempon trakti la trian. Ĉiuj estis direktitaj por laboro de la Komisiono pri la Strategiaj Demandoj.

Malgraŭ tio la nova estraro revenis al la demando pri la reta voĉdonado en aŭtuno 2010 kaj jarkomenco 2011. La traktado estis ĉesigita pro subita plurmonata malsano de la Ĝenerala Direktoro de UEA, Osmo Buller. La reanalizo de ĉiuj faktoroj ebligantaj la enkondukon de la reta voĉdonado prepare al la kopenhaga komitatkunsido reliefigis la neceson ŝanĝi ne sole la Ĝeneralan Regularon, sed ankaŭ la Statuton. Ĉiuj komitatanoj ricevis koncernan dokumenton. La diskuto kaj decidoj de la Komitata Kunsido en Kopenhago koncentriĝis tamen nur pri ŝanĝoj en la Elekta Regularo.

Estas afero evidenta, ke ĉiu ideodoninto de plibonigoj kaj lertigoj en la laboro de la Asocio interesiĝas pri la sorto de siaj ideoj kaj proponoj. De ĉiu membro UEA atendas danke komunan konsideradon de plibonigoj kaj lertigoj en maniero konstruema kaj ebliganta dialogon.

Barbara Pietrzak

## Esperantigo de propraj nomoj

Mi komencis lerni Esperanton fine de 2005, mia edzino Gisèle iom pli poste. Komence de 2007 ni jam ofte interparolis Esperante. Kelkfoje mi diris ekzemple “Mi tuj veturos al Vernuzo”, sed ŝi protestis: “Vi ŝiras miajn orelojn! Vernoux estas Vernoux (franca prononco Vernu’), ne Vernuzo. Ne esperantigu la proprajn nomojn!” Mi decidis studi la aferon kaj foliumis PIV-on. Mi trovis sep kategoriojn:

- 1) Esperanta nomo = origina nomo, ekz. Milano, Torino, Oslo.
- 2) Esperanta ortografio, origina prononco, ekz. Pikaso, Tiĉino, Vinĉi.
- 3) Facilaj kaj evidentaj: Amsterdamo, Berlino, Londono, Madrido, Rabato, kvankam la lasta povas okazigi ŝercon: Se vi bone marĉandas, vi povas aĉeti tapiŝon en Rabato kun rabato.
- 4) Kontraŭdiraj ortografioj: Aikso Provenca sed Bojolezo, Koŝio kaj Bordoŝo sed Ĉaŭdefono kaj Laŭzano, Marsejlo sed Marseljezo. Malbelaĵo: Mozarto (eble arto de la Mozo-valo aŭ mozaraba arto?), kvankam la germana z (prononco [ts]) tradukiĝas per c ekzemple en Salcburgo kaj Ŝvarcvaldo.
- 5) Propraj nomoj entenantaj komunajn vortojn, ekz. Bulonjo ĉe Maro. Oni rajtas do traduki la komunajn vortojn. Tamen, la angla vorto Town aperas en almenaŭ tri diversaj tradukoj: Briĝurbo (Bridgetown), Fritaŭno (Freetown) kaj Kapstado (Cape Town).
- 6) Du nomoj por la sama loko, ekz. Kalkato/Kalkuto, Pado/Poo, Pajno/Pano, Graŭbindo/Grizono.
- 7) Neesperantigitaj nomoj, ekz. Heine, Kalevala, eĉ de Zamenhof (!!!)

Mia konkludo estis, ke la esperantigo de la propraj nomoj fiaskis. En PIV mi trovis haoson. Mirinda verko, sed ne rilate al la propraj nomoj. La kialo estas simple, ke ne eblas esperantigi

la proprajn nomojn. Multaj propraj nomoj en PIV estas nekompreneblaj aŭ malbelsonaj por nacilingvanoj kaj tute senutilaj por fremdlandanoj. Supozu, ke ĉinaj turistoj volas viziti la Luarajn kastelojn. Ili havas gvidlibron en Esperanto kaj decidas komenci la viziton en Blois. Ili veturas suden de Parizo sed atingas la Pireneojn netrovinte la urbon Blezo!

Kompreneble, tiu analizo senrevigis min. Sed mi prenis la aferon humure kaj skribis mokede vojaĝrakonton:

Ni ekveturis de Bofrezo je la oka matene kaj atingis Podon je la deka. Post vizito de tiu interesa urbo, ni veturis sud-orienten ĝis Valso-Banurbo kaj Aŭbenaso. Poste, ekde Valo-Ponto-d’Arko ni sekvis la panoraman vojon de la Ardeŝa Kanjono, kies fina punkto estas proksima al Ponto-Sankta-Spirito. Dek kilometrojn pli sude, en Aŭtoj-sur-Sezo, ni transiris Rodanon kaj veturis norden ĝis San-Paŭlo-Tri-Kasteloj, kie ni eniris la Sudan Dromon. En Dioĝinfarisio ni vizitis la potistojn. Fine ni revenis hejmen tra Montelimaron, Privason kaj Vernuzon.

Nur Podo (Le Puy) kaj Rodano (Le Rhône), estas oficialaj nomoj. La ceterajn mi inventis laŭ la modeloj de PIV. Eble du nomoj necesigas klarigon. En la nomo Aŭtoj-sur-Sezo (Bagnols-sur-Cèze) mi iom troigis la humuron (en franca slango bagnole = aŭto). Dieulefit entenas nur komunajn vortojn, do la traduko estas Dioĝinfaris, kaj konsciencie mi aldonis la finan o. La aliajn lokojn la leganto povas diveni: Boffres, Vals-les-Bains, Aubenas, Vallon-Pont-d’Arc, Ardèche, Pont-Saint-Esprit, Saint-Paul-Trois-Châteaux, Drome, Montélimar, Privas kaj Vernoux.

Poste mi legis la verkon de Bertilo Wennergren, PMEG. Bertilo skribas, ke oni ne estas devigata esperantigi ĉiujn proprajn nomojn. Tio dependas de la kunteksto. Kompreneble, kelkaj nomoj kiel Parizo, Tuluzo, Bordoŝo estas jam delonge konataj en la tuta mondo. Mia edzino pravis.

En septembro 2008 mi hazarde trovis la lastan numeron de la revuo *La Sago*. Ĝi entenas artikolon de Andreo Andrio (verŝajne kaŝnomo) “Kiel esperantigi proprajn nomojn?”. Temas pri la oka artikolo de la serio, kaj ĝi entenas proponojn por la esperantigo de francaj propraj nomoj entenantaj la grupon -ill. La proponitaj “reguloj” ŝajnas komplikaj. Kiu komprenas, kio estas Miljaŭo (=Millau)? Kiam francoj parolas kun francoj, ili komprenas sin pli bone uzante la francajn nomojn. Kiam ili parolas kun eksterlandanoj, la franca prononco povas esti malfacila, sed eblas precizigi: “en la urbo Milly: m-i-l-l-y”. La nomon Milio (esperantigo de Andrio) eksterlandanoj ne komprenus, nek la francoj! La germanoj eĉ rifuzis la esperantigon de la nomo de la poeto Heine. Kial do la francoj devus pene labori por esperantigi ĉiujn francajn proprajn nomojn? En humuro, tio ja taŭgas: ekzemple Trifouilly-les-Oies estas franca humura nomo de iu vilaĝo situanta, kiel diras la finnoj, “malantaŭ la dorso de Dio”, kaj al ĝi respondas eble “Aĉaĵejo-la-Anseroj”.

La esperantigo de propraj nomoj interesas la esperantistojn de ĉiuj landoj. Eble ne-eŭropanoj estas eĉ pli koncernataj ol eŭropanoj. Kion pensus ekzemple japanoj aŭ ĉinoj, se francoj aŭ aliaj eŭropanoj komencus amase esperantigi siajn proprajn nomojn? Mi esperas, ke la revuo *Esperanto* ricevos lavangon da reagoj similajn al tiuj okazigitaj de Anna Löwenstein per sia artikolo “Poetoj detruas nian lingvon”.

Hannes Larsson

*hannes.larsson@wanadoo.fr*

# Nova grupo ĉe la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ekzamenoj pri instruista trejnado

**La 5-an fojon komencis siajn 3-jarajn studojn nova grupo ĉe la Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) la 17-an de septembro.**



La interlingvistika grupo sidas en la salono. Foto de John Wells

**L**a partoprenantojn el 10 landoj salutis la vicdekano de la Novfilologia Fakultato, prof. Jerzy Kaliszan. Li emfazis la unikecon de la interlingvistikaj studoj, jam bone instalitaj en la Novfilologia Fakultato, kaj la ĝojon, ke ĝi altiras partoprenantojn el diversaj landoj. La gvidantino de la Studoj prof. Ilona Koutny bonvenigis la partoprenantojn, skizante la 13-jaran historion de la Studoj kaj la sekvantajn kursojn kaj taskojn. La studoj povis starti dank' al la stipendioj de ESF kaj de ILEI-UEA, kaj al la entuziasmo de la partoprenantoj, speciale de la brazila grupo.

La 20 kursanoj (5 el Brazilo, po 3 el Hungario, Pollando kaj Svislando, po unu el Francio, Germanio, Italio, Hispanio, Rusio kaj Usono) konsistas plejparte el junuloj, sed ne mankas spertaj esperantistoj (eĉ unu estrarano de UEA kaj la gvidantino de la Ekzamena Komisiono de ILEI). Ili povis partopreni dum la sekvaj 4 tagoj en 4 intensaj kursoj: prof. John Wells prezentis kun vervo diversajn sistemojn en la mondo kaj pli detale la fonetikon de Esperanto; prof. Vera Barandovská-Frank traktis interlingvistikon: de la tereno de interlingvistiko kaj la internacia lingvosituacio tra la etnaj interlingvoj kaj piĝinoj ĝis planlingvoj; prof. Aleksander Melnikov analizis la nocion de kulturo kaj speciale la terenojn de la E-kulturo kaj la fonajn sciojn de tipa esperantisto; Lidia Ligęza pliproksimigis al la ĉeestantoj la poezion kaj Tomasz Chmielik la prozon de la unua periodo de la Esperanta literaturo. Ne mankis diskutoj kaj reagoj.

Paralele al la sesio okazis ekzamenoj de 4 studentoj finintaj la 3-jaran studadon kaj de 10 partoprenantoj de la unujara instruista trejnado (komuna entrepreno

de la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj de ILEI kun la kontribuo de *edukado.net*). En la unua grupo defendis sian laboraĵon kaj respondis al la demandoj de la ekzamenkomisiono: Marija Jerković (kroataj lernolibroj de Esperanto kaj iliaj verkintoj), Tea Radovanović (kroata literaturo tradukita al Esperanto), Sean Healy (maŝina tradukado kaj Esperanto), Petro Baláž (moderna informado kaj DVD kreita ĉe E@I) – ĉiuj stipendiitoj de ESF. La alia grupo (Magdalena Feifčová, Ildikó

Joóné Ladányi, Gisela Macioszek, Arlette kaj Edmond Plutniak, Gizela Sklorz, Svetlana Smetanina, Petra Smidéliusz, Margaretha Symoens, Szabolcs Szilva) krom sia pli mallonga kaj praktika laboraĵo devis ekzameniĝi pri gramatiko, literaturo kaj movado de Esperanto por akiri la instrurajtigojn de ILEI. Pluraj analizis lernmaterialojn kun la gvido de d-rino Katalin Kováts. Flanke de ILEI partoprenis la ekzamenojn Zsófia Kóródy. La laboraĵoj estas konsulteblaj ĉe *edukado.net*.

## Dua Interlingvistika Simpozio

**L**a interlingvistikan sesion sekvis Interlingvistika Simpozio (22-23.09.2011) “Interlingvistiko kaj esperantologio antaŭ la defioj de la 21-a jarcento” same en la Novfilologia Fakultato, organizita la 2-an fojon (la antaŭa okazis kadre de la dekjarigo de la Studoj en 2008).

Partoprenis ĝin kvindekda homoj el 15 landoj: novaj kaj malnovaj gestudentoj, la alvenintaj instruistoj kaj kelkaj aliaj

aliĝintoj. Dum la malfermo kaj la vicdekano de la Novfilologia Fakultato kaj la vicedirektoro de la Lingvistika Instituto emfazis la gravan kaj prestiĝan rolon de interlingvistiko en la scienca vivo de la fakultato, dankis la organizan laboron de la iniciatinto kaj gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, prof. Ilona Koutny.

La dudeko da prelegoj okazis en 4 sekcioj: lingvistiko, metodiko, movado



Malfermo de la Interlingvistika Simpozio: vicedirektoro de la Lingvistika Instituto, vicdekano de la Novfilologia Fakultato, prof. Ilona Koutny kaj prof. John Wells.



# Irlanda Ministro pri EU-Aferoj malfermos la EEU-Kongreson


**Kiam okazas sukcesa UK aŭ alia Esperanto-Kongreso, oni foje aŭdas postajn plendojn pri tre malgranda, aŭ eĉ nula efiko al la granda ne-esperantista komunumo en la kongresa loko. Do, interna movada sukceso samtempe iĝas malsukceso por la disvastiĝo de Esperanto.**

Ni tre konscias tiun fakton, preparante la 9-an Kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio, kiu okazos en Galivo, ĉe la okcidenta marbordo de Irlando julio 2012. Jam vidiĝis sukcesoj de tiu aliro: akceptis malfermi la kongreson la juna irlanda ministrino pri EU-aferoj, Lucinda Creighton. Verŝajne la novelektita Prezidento de Irlando, Michael. D. Higgins, loĝanto de Galivo, estos la alta protektanto de la kongreso – ni tuj invitis lin la tagon de lia elekto, la 29-an de oktobro 2011. Parolos la Komisionano pri Oficialaj Lingvoj, Seán Ó Cuirreáin, kiu jare raportas al la irlanda parlamento pri la efektivigo de la Leĝo pri Oficialaj Lingvoj, 2003. Ĉar la kongresa temo, “Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli” aparte taŭgas dum la nuna ekonomia krizo kaj en la specifa lingva situacio de Irlando, parolos aro da ne-esperantistaj fakuloj, ekzemple d-ro Eugene McKendry, direktoro de la informcentro pri lingvolernado de la universitato de Belfasto, kaj d-ro Nollaig Ó Muraíle, fakulo pri la irlanda lingvo de la universitato de Galivo. Kaj ne mankos esperantistaj interlingvistaj fakuloj, kiel

Profesoro Wim Jansen de la universitato de Amsterdamo. S-ino Angela Tellier, ĉefmotoro de la brila brita programo, S2L/Springboard to Languages, efike kunlaboras kun la juna instruistino Louise Bhreathnach, kiu instruas Esperanton laŭ la S2L-programo en la baza lernejo Scoil Iognáid.

La kongresa temo aparte taŭgas por Irlando, antaŭ ĉio pro la situacio de lingvolernado en la lando. Tre malmultaj sukcese lernas fremdajn, kaj du trionoj de la infanoj eĉ ne sukcesas ellerni la propran nacian lingvon, la irlandan, kiu estas deviga por ĉiuj infanoj en bazaj kaj mezaj lernejoj. La ĉefa kialo estas la anglalingveco de Irlando, kiu igas nenecesala lingvolernadon, laŭ la disvastigita opinio. Samkiale similas la lingvolernado en Britio, sed tiu fakto ne klaras al sekcioj de la loĝantaro, kiuj emas kulpigi la lernadon de la malfacila irlanda, kelta lingvo kiu ege malsimilas la anglan, pri la malsukceso lerni aliajn lingvojn.

Aparte bone funkcias la antaŭkongresa reklamado: lastatempe publikigis multaj pozitivaj artikoloj pri Esperanto en la plej popularaj galivaj gazetoj, la *Connacht Tribune* kaj la *Galway City Tribune*, kaj okazis intervjuoj kun lokaj radio-stacioj. Estis intervjuo kun juna loka esperantisto, Somhairle MacAodha, filo de la konata verkisto kaj tradukisto Garbhan Mac Aoidh. Iam helpas la fortaj galivaj ligoj de la nuna prezidanto de EEU, kiu studis 6 jarojn tie kaj prelegas ĉiujare en la universitato de Galivo: kuzo lia, d-ro James Browne, estas prezidanto de la universitato, onklo lia, d-ro Michael Leahy, estis 3-foje urbestro de Galivo, kaj kuzino lia, Mary Leahy, organizis ke la urbestro de Galivo invitis EEU kongresi tie.



La 9-a EEU-Kongreso okazos 16-20 julio 2012, kaj finiĝos pli ol semajnon antaŭ la Hanoja UK. Eblas rekte aliĝi rete al la Kongreso ĉe <http://eeu-kongreso.webnode.com>

**Seán Ó Riain**  
Prezidanto de EEU

**Judy Murphy meets Seán Ó Riain, vocal advocate for greater use of Esperanto**

EVER since he was in national school, Seán Ó Riain always loved learning – and unlike most pupils, he didn't have a favourite subject. He was what might be called a swot.

But, being wise, he kept his passion for learning quiet, realising that most people didn't share it. Nonetheless, he studied on, and at the age of 16, went to UCG to study Arts.

Because he was so young the Tipperary born student was sent to stay with his uncle's family in Galway. For two years Seán lived with Michael Leahy – Fianna Fáil Mayor of Galway on several occasions, notably during US President Ronald Reagan's visit in 1984 – and Michael's family in Renmore.

Seán did his degree in Galway, followed by a H Dip in Education and an MA in Irish. He subsequently went on to take a PhD in Irish in Trinity and has since built a successful career in the Department of Foreign Affairs, currently being based in Brussels. He speaks Irish, French, German, Polish, Welsh, Scots Gaelic... and Esperanto.

Esperanto is a topic, which causes Seán – the current president of the European Esperanto Union – to bubble with enthusiasm, and he says he could talk about it for hours.

This language was invented at the end of the 19th century by Dr L.L. Zamenhof (1859-1917). He lived in what is now Poland, but was then divided between Russia, Germany and Austria, explains Seán. Zamenhof grew up in Warsaw, a city of 30,000 people, where five languages were spoken – Russian, German, Polish, Ukrainian and Yiddish, with Yiddish being most common.

This situation left a lot of room for misunderstanding and conflict, and Zamenhof wanted to change this. He felt a neutral language that would allow people to communicate on terms of equality, would prevent powerful nations such as Russia imposing its language on weaker neighbours.

It was a vision that struck a chord in early 20th century Ireland, a country with a powerful neighbour which also imposed its will. Two of the 1916 leaders,

James Connolly and Joseph Mary Plunkett were fluent Esperanto speakers.

Many of the root words of Esperanto come from European languages with Latin, French, German and English all contributing. But, says Seán, its grammar is easier than any of the languages from which it is drawn.

In the beginning, it was called Lingva Internacia – the International Language. But when Zamenhof introduced it publicly, he used the name Dr Esperanto, which means 'Doctor who hopes', and eventually it just became known as Esperanto.

Seán first heard of Esperanto as a 14-year-old schoolboy at school in Roscrea in 1969, when an international conference on the language was held in Dublin. He and a group of fellow students clubbed together and bought a 'Teach Yourself Esperanto' book.

"But the general attitude among the teachers was negative," he recalls, and the boys' enthusiasm waned. He paid off the others and kept the book. However, it was many years later – with several other languages under his belt – that he returned to it.

Seán worked in the Irish embassy in Vienna for three years, where he heard there was an Esperanto college, but by then he was wary of getting caught up in any 'cultish' movement. In any case, he learned that the centre wasn't open during the week and, while he was interested in visiting, he wasn't giving up his weekends to explore it.

A few years later he was posted to the Irish Embassy in Australia where he met Australian diplomat Ralph Harry, who had been an Australian ambassador to Japan, Germany and the United Nations, among others. Ralph Harry spoke several languages fluently, including Esperanto, which impressed Seán.

"We got to know each other, and Ralph told me I could learn it in three months from books. I didn't believe it was possible, but it was." Seán's proficiency in other languages gave him a head start on Esperanto, but he insists that it's easier to learn than any other language, because there are no exceptions to grammatical rules.

There is one way of framing things in the past tense, one way in the present and one in the future. Nouns and pronouns – singular and plural – follow rules, as do verbs, adverbs and adjectives. For instance, all vowels end in O, Adjectives end in A and adverbs end in E.

And while it may look like a mix of other languages, that's a superficial view.

kaj literaturo. Fine de ĉiuj sekcioj okazis diskutoj pri la defioj al la donita tereno. Kelkaj ekzemploj el la programo: translingvigi kulturajn Esperanton (A. Melnikov), Globish (M. Farris), ekstermovadaj kunlaborebloj (Zs. Kóródy), RITE: Reta Instruista Trejnado ĉe [edukado.net](http://edukado.net) (K. Kováts), lingvopolitiko de UEA ĉe UN (S. Keller), atendoj de la

esperantistaro rilate al UEA (Z. Galor), la Esperanta literaturo sojle de la 21-a jarcento – kien, kiel kaj por kiu? (T. Chmielik). Programo ĉe <http://edukado.net/upload/enhavo/dosieroj/anoncoj/Interlingvistika%20Simpozio-1.pdf>.

La jaŭda bankedo pasis en tre bona etoso. La dekanino de la Novfilologia Fakultato ĉeestis kaj diris kelkajn favorajn

vortojn pri la Interlingvistikaj fako kaj simpozio.

Kiel kutime – la tuton semajnfine kompletigis la kultura arango Arkones kun aldonaj prelegoj, spektakloj kaj koncertoj. Tiel la gestudentoj povis ekkoni ankaŭ la polan esperantistan medion kaj agrable malstreĉiĝi.

**Ilona Koutny**

# Ĉu la nepoj nin benos?

**Nia movada juvelo trankvile kaj modeste kaŝiĝas inter la muroj de la Centra Oficejo en Roterdamo. La laboro kiun ĝi postulas estas benediktana kaj temporaba, ne tiom spektakleca kaj certe ĝi ne donas tujajn rezultojn pri kiuj oni povus fanfaroni, ekz. en la asocia organo. Sed tio absolute ne signifas, ke ĝi estas malpli bezonata aŭ malpli grava! Ŝajnas al mi, ke multaj ne konscias pri la valoro de nia asocia biblioteko, kies historio estas same longa kiel tiu de UEA mem.**



Foto: Francisco L. Veuthey

**D**um ses someraj semajnoj mi ĝuis la eblon volontuli en Biblioteko Hector Hodler, kies mirindecon mi malkovris certe ne kiel la unua, same ne kiel la lasta esperantisto. En diversgrandaj skatoloj mi trovis periodaĵojn kiuj montras la historion de la Esperanto-movado kaj atestas pri la sinteno de la esperantistaro al la mondo kaj gravaj historiaj okazaĵoj de la 20-a jarcento. Tiu kolekto vere impresas per sia abundo kaj relativa kompleteco.

Bedaŭrinde, ĝis nun ĝia prizorgado ne ricevis tiom da atento kaj financaj rimedoj, kiom ĝi meritis; ekz. mankas kompleta katalogo kaj parto de la kolekto estas damaĝita pro manko de

protekto kontraŭ sunlumo, humideco, polvo ktp. Feliĉe en la CO kaj en la Estraro estas homoj kiuj komprenas la gravecon de la problemoj kaj la biblioteko ĝuas pli kaj pli grandan atenton.

La biblioteko unue troviĝis en la dua etaĝo de la roterdama domo, sed tie ĝi fariĝis jam danĝera pro sia pezo. Okaze de la renovigado de la Centra Oficejo ĝi estis translokita en 2006 al la Salono Zamenhof en la teretaĝo, la ĝistiam kunsido. Nun la libroj kaj periodaĵoj havas tie decajn kondiĉojn: ili ripozas en modernaj – belaj kaj utilaj – rulbretaroj, kiujn UEA aĉetis dank’ al la donacoj de malavaraj esperantistoj. Okazis ankaŭ aliaj plibonigoj, ekz. malpliheligitaj fenestroj kaj malpli alta temperaturo.

La oficisto Ralph Schmeits kunordigas la realigadon de diversaj necesaj ŝanĝoj. Helpas Rob Moerbeek, jam de multaj jaroj la ĉefa prizorganto de la biblioteko, kaj aliaj volontuloj kiel Wim Baris kaj Heidi Goes. La prioritato estas ordigi la kolekton kaj savi la dokumentojn, kiuj estas en malbona stato. La periodaĵoj estas enmetataj en skatolojn el neacida kartono (la samo atendas poste la librojn), produktitajn laŭ la samaj striktaj normoj kiuj validas en la Reĝa Biblioteko en Hago, la nacia biblioteko de Nederlando. La skatoloj estis faritaj laŭ aparta mendo, tiel, ke ilia grandeco kongruas kun la dimensioj de la bretaroj. Tio ebligas ŝpari lokon por novaj, alvenontaj libroj kaj periodaĵoj.

Kelkaj povus demandi, ĉu ni vere bezonas tiujn penon kaj elspezojn. Ĉu ne estus pli bone streĉi fortojn nur por informado, instruado? La respondo estas mallonga: ne. Taŭgas pensi pri la celoj kaj bone plani ilian realigon. Se ni atingos per informado tion, kion ni volas – por diri tion idealisme kaj elvoke – la finan venkon, trezoron similan al BHH posedos nur la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj ĝia Internacia Esperanto-muzeo kaj Kolekto por Planlingvoj, kiuj tamen ne estas regataj de esperantista organizo, sed de la aŭstria ŝtato. Cetere, eĉ kaze de malsukceso gravas kolekti la fruktojn de la kulturo kiun ni kreas.

La gravecon de la biblioteko kaj ĝian utilecon povas pruvi ankaŭ gravaj movadanoj – la aŭtoroj de libroj kaj artikoloj, kiuj iel baziĝas sur la dokumentoj trovitaj en BHH, kiel ekz. d-ro Ulrich Lins (*La danĝera lingvo*) aŭ d-ro Ziko van Dijk (*La Asocio*). Ni ankaŭ ne povas antaŭvidi, por kiu utilos Biblioteko Hector Hodler en la estonteco...

“La nepoj vin benos, se vi pacience eltenos”, skribis Zamenhof en la konata poemo *La vojo*. Efektive, la laboron, kiun oni nun faras en la biblioteko, povos aprezi precipe ontaj generacioj. Por ili ni konservu niajn hodiaŭajn kulturaĵojn. Sed ĉu ni eltenos? Multo dependas ankaŭ de vi, kara leganto! Helpu, laŭ viaj eblaj, donacante eĉ etan sumon al la fondaĵo Biblioteko.

**Paweł Fischer-Kotowski**



Belaj kaj utilaj rulbretaroj de Biblioteko Hector Hodler



# SEJM: Legendoj pri legendo

**Legendoj pri SEJM. Mikaelo Bronŝtejn.**  
**Moskvo: Impeto, 2006 (3-a eld). 231 p. 20 cm.**  
**Ilus. ISBN 5716101526. Prezo: € 15,00**

**L**a libro ne estas sistema historio pri SEJM, Sovetia Esperantista Junulara Movado, ekzistinta en Sovetunio inter 1966 kaj 1979, sed konsistas el sinsekvo de ĉapitroj pri unuopaj gravaj temoj kiel la genezo de SEJM, diskuto pri statutoj kaj oficialigo, neforgeseblaj Esperanto-renkontiĝoj kaj -tendaroj en Sovetio kaj brigadoj en eksterlando, konflikto inter generacioj, agadoj en lokaj kluboj, vizito de Lapenna en Moskvo, poezia produktado en Esperanto.

La unua eldono de la libro aperis en 1992, la dua en 1998, kaj ĉi tie temas pri la tria korektita kaj kompletigita el la jaro 2006. Eldonita ĝi estis de REU kaj Impeto en Moskvo. SEJM – tio estis kolektumo de junaj sovetiaj esperantistoj, inter kiuj troviĝis komsomolanoj, sindikatistoj kaj membroj de KPSU, do aktivaj sociaj agantoj kaj seriozaj profesikarieruloj. Ili celis efike apliki kaj progresigi Esperanton en la stagna politika kaj socia vivo sub Breĵnevo, do en novstalinisma etoso de multaj malpermesoj kaj persekutoj. Al la grupo de reprezentaj nomoj de SEJM, ankaŭ internacie konataj, kiuj formis la ĉefan motoron de tiu organizaĵo, esence apartenis Anatolo Gonĉarov (Siberio), Vladimir Samodaj (Moskvo), Boris Kolker (Baŝkirio), Dmitriĉ Cibulevskij kaj Miĥail Lineckij (Ukrainio), Ivan Lisiĉnyj (Kazaĥio), Jefim Zajdman (Krimeo), Vytautas Ŝilas (Litovio), Aristids Mediņš (Latvio), August Kilk (Estonio), Eŭgeno Perevertajlo (Uzbekio), Viktor Aroloviĉ (Moskvo), Vladimir Bepalov (Soĉi), Valerija Cvetkova (Leningrado), Dina Lukjanec (Siberio) kaj nature Mikaelo Bronŝtejn mem, kiu tiam vivis en Ĥmelnickij (Ukrainio), poste en Vorkuta (Komi).

SEJM, kies starigo laŭdire estis sugestita de Humphrey Tonkin, neniam fariĝis amasmovado, sed la membraro en ĝiaj kluboj tamen kreskis de 150 personoj en 1965 al 1200 en 1975 (laŭ Cibulevskij, *SEJM, historia skizo*, 1994, p. 17). Bronŝtejn, la aŭtoro, kiu ne plu ĉion klare memoras, nomas siajn memuarojn “legendoj”. Ĉar ili permesas iom fantazii. SEJM intencis aliĝi al TEJO kaj lanĉi vastan agadon organizan, korespondan, studentan, redaktan, kontaktan, tradukan, kulturan, eĉ aŭtostopan kaj

historiografian. Kaj: Grava celo de la sovetia esperantistaro estis akiri gvidan rolon en la tutmonda Esperanto-movado, kiel Vladimir Samodaj fanfaronis en *Juna Esperantisto* 1/1966. Do, temis pri altaj ambicioj, pri kiuj la izolitaj sovetianoj revis kaj en Okcidento preskaŭ neniu (kon)sciis. Sed en la lukto por oficiala agnosko li avertis ankaŭ: “Se ni ne montros utilon de nia agado, oni neniam agnoskos nin oficiale kaj ĉiam konsideros nin bagateluloj. Por venki ni devas esti organizitaj.” Paradoкса estis la situacio, ĉar SEJM fariĝis organizaĵo, kiu oficiale ne ekzistis, aŭ ne rajtis ekzisti: “Kontraŭdira estis SEJM, ĝis absurdo”, skribas Bronŝtejn, ĉar “nia, esence disidenta movado, subfosanta monopolon de la ŝtato por eksterlandaj kontaktoj, regule raportadis al la oficialaj instancoj pri niaj sociutilaj agoj”

(p. 6). Kvankam SEJM ne malkonformis al la proklamata celaro de la ŝtata propagando kiel porpaca batalo, plifortigo de internacia amikeco, eĉ disvastigo de kontraŭfaŝismaj kaj komunismaj ideoj, ĝi ŝajne ne ricevis la ŝancon esti oficiale registrita. Simple tiel fondi kaj funkciigi organizaĵon sur tutsovetia nivelo estis miloble pli malfacile ol ricevi la permeson por iu loka klubo, kies beno dependis de la kapricoj de lokaj oficialuloj kaj de ties ambivalenta sinteno al Esperanto, kiel Bronŝtejn klarigas en la sepa ĉapitro de siaj legendoj. Aliflanke, ekzemple la filatelistoj

ja ricevis sian tutlandan asocion, ĉar evidente ili kapablis pruvi la neceson de sia organizaĵo. Sed ĉu Esperanto estas komparebla kun filatelo, kaj kiel oni povas pruvi al la ŝtato la neceson de sia organizaĵo?

Kiel ajn, la historio de SEJM montras, ke eblis ekzisti ankaŭ sen formala agnosko. Nature, la ‘filistra’ burokrataro ĉiam scipovis malhelpi kaj ĉikani kiam eblis, kaj tion la esperantistoj devis elteni. Ŝajnas, ke inter sovetiaj oficialuloj regis iom alia logiko, kiel montras jena atentinda letero el Komsomolo de aŭgusto 1966 al k-do Gonĉarov: “Ni dankas vin pro la letero kaj proponoj pri la propagando de Esperanto. Ni pensas, ke ne estas neceso fondi la junularajn Esperanto-organizaĵojn, kiel ni ne fondas organizaĵojn por la gejunuloj, studentaj aliajn lingvojn de la mondo. La laboro devas esti farata en la kadroj de rondetoj kaj kluboj de Esperanto, kiuj rajtas kalkuli je praktika helpo de la lokaj komsomolaj organizaĵoj kaj siavice helpi al Komsomolo en la internaciisma edukado de la junularo.” El tiu ĉi rimarkinda letero oni povas konkludi, ke la sovetia reĝimo





tute ne estis interesata de la propagando de Esperanto, sed inverse, ĝi estis interesata, ke esperantistoj disvastigu la ideojn de la sovetia politiko. Ĉu do temis pri baza miskompreno, ambaŭflanke, aŭ pri intenco, konscia ludo? Bronŝtejn opinias, ke similaj respondoj el la ŝtata aparato servis por averti la esperantistojn, ke ili prefere ne plendu, ĉar ili ja havas ĉion: vortarojn, lernolibrojn, klubejojn... Bronŝtejn riproĉas al la aŭtoritatuloj hipokritecon, verŝajne prave.

En 1979, kiam SEJM, sen rajto ekzisti kaj de la komenco suspektata de la olda generacio kaj de la oficialuloj, elĉerpiĝis, profesoro Isaev fariĝis la ĉefo de la ŝtate kontrolata ASE, asocio kiun Bronŝtejn nomas hontinda (p. 218). En sia tekstaro Bronŝtejn publikigas leteron de Isaev

de la 9-a de oktobro 1979, kiu klare pravas lian kontraŭstaron precipe kontraŭ SEJM-tendaroj, kiuj laŭ lia rigora opinio “pasis en ne sufiĉe alta politika kaj organiza nivelo.” Sekve: “Tian praktikon ne eblas aprobi plu.” Punkto.

Ankaŭ la dua parto de la libro de Bronŝtejn estas leginda, ĉar tie la ofte bizaraj legendoj subite transformiĝas en specife sovetian humuron. Por studi tiun ‘humuron’, kiu aspektas preskaŭ jam kiel sarkasmo aŭ eĉ ciniko, necesas kaj bonvenas la malkaŝaj memoroj de sovetiaj esperantistoj kiel Bronŝtejn, Samodaj, Cibulevskij, Ĥarkovskij kaj Stepanov, kiuj jam signife kontribuis per propraj verkoj. Tiel indus, necesus kaj eblus reskribi la apenaŭ kredeblan historion de la sovetia esperantismo post la morto de Stalino.

Andreas Künzli

## Fino bona, ĉio bona... ĉu?

**Proverbaro tutmonda. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2010. 157p. 21cm. ISBN 2906134899. Prezo € 13,50**

La libron verkis kaj eldonis André Cherpillod, konata pro pluraj pli fruaj broŝuroj, pli aŭ malpli dikaj, pri plej diversaj temoj lingvaj. Tiu ĉi eldonaĵo el lia komputilo estas de la konataj stilo kaj aspekto. Kaj ankaŭ en tiu ĉi kazo aperas tekstoj en pluraj skribsistemoj. La libro enhavas Esperantajn proverbojn (kaj kelkajn aliajn frazeologiaĵojn). La proverboj aperas kun tradukoj en diversaj aliaj lingvoj. Ilin antaŭas kelkpaĝa enkonduko pri la temo “proverbo”.

La Esperantaj proverboj estas ĉirkaŭ 900, kaj ili estas alfabeto ordigitaj. Iuj el ili referencas al alia similtema proverbo en la libro (kaj ĝenerale tiam ne havas proprajn tradukojn – ja ne necesas ripeti la samajn tradukojn en pluraj lokoj en la libro...). Tiuj proverboj estas denove menciitaj ĉe la proverboj, al kiuj ili referencas. Tiel ĉiuj similtemaj Esperantaj proverboj troviĝas en unu loko. Ĉe la proverboj estas ofte menciita(j) unu aŭ eĉ du fontindikoj. Ja indas scii ĉu proverbon publikigis Zamenhof, Waringhien aŭ Boulton. (Sed tamen en mia *Proverbaro Esperanta* de Zamenhof mi ĝis nun ne trovis la vortojn centimo aŭ eŭro...)

La tradukoj aperas en ĉirkaŭ 90 lingvoj. Post ĉiu “traduko” (simil-tema proverbo en alia lingvo) sekvas ankaŭ laŭvorta re-traduko en Esperanton de tiu alilingva proverbo. Oni povas do kompari la “bildon” de la Esperanta proverbo kun la bildoj de la alilingvaj. Ke oni re-tradukas alilingvajn “tradukojn” al la baza lingvo de proverbaro ne estas malkutime. Tio plaĉas al mi pro la alikulturaj bildoj kiujn tiuj povas transigi; ja mi ne tiel bone regas aliajn lingvojn. La franca, la germana kaj


la angla estas la plej bone reprezentataj lingvoj inter la tradukoj. En la franca aperas tradukoj de preskaŭ ĉiuj proverboj, kaj pli ol duono estas tradukita ankaŭ en la anglan kaj germanan. Kelkaj aliaj lingvoj atingas eble kvinonon ĝis kvaronon de la Esperantaj proverboj. Kaj la plej multaj lingvoj estas multe malpli ofte troveblaj en la libro. Pri la nederlanda mi povis konstati ke mankas pluraj proverboj kiuj estas preskaŭ ekvivalentoj de la Esperantaj. Ĉu la kontribuinto pri la nederlanda tiujn ne sciis, aŭ ĉu simple la dato por eldono alvenis, tiel ke tiuj proverboj ne sukcesis atingi la paperan version?

La paĝoj estas sufiĉe dense plenigitaj per teksto, ja la ĉirkaŭ kvin mil proverboj plenigas nur 157 paĝojn. Oni povas rekoneti la “ĉefajn” Esperantajn proverbojn laŭ simbolo, sed cetere la amaso da literoj konsistigas tre densan vorto-maron. Por romano tio ne gravas, sed konsultlibro kia tiu ĉi iom suferas pro tio. Bedaŭrinde mankas en la libro indeksoj kiuj ebligis trovi proverbon laŭ certaj kriterioj. Sen tiaj indeksoj necesas koni la proverbojn por povi trovi ilin en la ĝusta (alfabeta) loko en

la libro. Aŭ havi la fontajn verkojn, por povi trovi ilin tie.

Konklude mi povas diri, ke ĝi estas interesa libro por ŝatantoj de proverboj. Kaj se vi bezonas francan (aŭ germanan, anglan) tradukon, vi povas bone kombini ĝin kun la Zamenhofa verko. Sed vera studlibro ĝi ne estas, ĉar ne eblas laŭcele serĉi kaj trovi proverbojn. Krome, la aŭtoro indikas neniujn bibliografiajn fontojn.

Rob Keetlaer



# Konatiĝu kun Dokumenta Esperanto-Centro

**Unu el la ricevintoj de la ĉi-jara Subvencio Cigno estis Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) en Kroatio, kies diversaj aktivajoj estas nesufiĉe konataj al la ĝenerala publiko. Jen okazo por prezenti ilin.**

**L**a kolekto de esperantaĵoj titolita Dokumenta Esperanto-Centro komencis formiĝi antaŭ pli ol tridek jaroj per sistema laboro de Josip Pleadin el Đurđevac kaj per multegaj donacoj de maljunaj esperantistoj. Tiel formiĝis la plej ampleksa kaj laŭdire la sola uzebla Esperanto-kolekto en Kroatio. Ĝi ankoraŭ ne estas honorigita per la titolo de “nacia kolekto”, kvankam ĝi oficialiĝis en junio 2010 per fondo de samnoma civitana societo kiu zorgas pri la kolekto, kaj kvankam ĝi fariĝis interesa temo ankaŭ por la landa asocio Kroata Esperanto-Ligo.

DEC kiel specifa Esperanto-societo fondiĝis por progresigi la konservadon kaj uzadon de la Esperanta kulturheredaĵo, kaj kiel sian finan celon ĝi difinis atingi la statuson de ŝtate aŭ regione protektata kolekto, kiu estus konsiderata nacia heredaĵo. Per tio estus garantiata ankaŭ la socia zorgo pri la kolekto en la estonteco. La unua reago flanke de fakuloj venis pasintjare per respondo de kroata Ministerio pri kulturo, en kiu ĝi konsilas starigi kontaktojn kun la konservista fako de la Ŝtata arkivo en Bjelovar kaj konkursi por subvencioj kadre de la Ministerio pri kulturo. Ekzistas pluraj antaŭkondiĉoj plenumendaj, kiuj garantius la socian protekton de la kolekto en la estonteco, kaj DEC kiel societo klopodas atingi la necesan nivelon postulatan de arkivistaj fakuloj.

En 2010 la kolekto estis premiita de UEA per la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen, kaj ĉi-jare UEA daŭrigis sian subtenon per la Subvencio Cigno. La subteno havis fortan reeĥon en la loka kaj regiona gazetaro, kaj pri DEC estis elsendita filmo en la regiona televida kanalo Srce TV.

Menciindas, ke ekde sia oficiala enskribiĝo en la registro de civitanaj societoj de Kroatio, DEC komencis intensan kunlaboron kun diversaj institucioj. Pasintjare tiu kunlaboro estis turnita al Bjelovar, la urbo de la sukcesa “renesanca”, landa kongreso. Per pruntoj de Esperantaj eldonoj de Andersenaj verkoj, DEC partoprenis la grandan ekspozicion organizitan de la Urba muzeo de Bjelovar sub la titolo “Bonan vesperon, sinjoro Andersen”, kiu gastis ankaŭ en Pakrac, kaj kiun malfermis la dana ambasadoro en Kroatio, s-ro Bo Eric Weber, kiu kun intereso informiĝis pri Esperanto, renkonte al la UK okazonta en Danlando. Aparte gravan atenton de la gazetaro kaj televido havis la ampleksa ekspozicio “100 jaroj de Esperanto en Kroatio”, organizita de DEC en kadre de la 9-a landa kongreso. La ekspozicion en la prestiĝa salono de la Urba muzeo malfermis Antun Korušec, la urbestro de Bjelovar. Speciala ekspozicio de Esperantaj antologioj, organizita de DEC, estis prezentita antaŭkongrese en la Popola biblioteko de Bjelovar. DEC eldonis 5 000 kolorajn informprospektojn pri Esperanto kaj distribuis ilin en ĉiuj lernejoj de Bjelovar. En majo ĉi-jare DEC kandidatis la urbon Koprivnica kiel gastiganton por la jubilea 10-a kongreso de kroataj esperantistoj, kun la subteno



de la Urbo Koprivnica kaj la Departemento Koprivnica-Križevci. La kandidatigon akceptis Kroata Esperanto-Ligo kaj la organizadon de la kongreso ĝi komisiis al DEC. La kongreso okazos inter la 22-a kaj 24-a de junio 2012. Kunlabore kun la Komunumo Bregi DEC organizas starigon de dulingva memortabulo (nova ZEO en Kroatio) al la fama fervojisto-esperantisto Ilija Puhalo (1899-1937) en lia vilaĝo Bregi apud Koprivnica, okaze de la 75-a datreveno de lia morto. Ilija Puhalo estis proksima amiko de Edmond Privat, kiu en 1926 vizitis la vilaĝon kaj la tiean tre aktivan Esperanto-klubon.

En DEC aktuale okazas kelkaj gravaj historiaj esploroj: bibliografiado de artikoloj de kaj pri Tibor Sekelj, renkonte al 2012, la jaro de Tibor Sekelj, preparoj por la festado de la 50-jariĝo de la fondo de la Esperanto-kampadejo en Primošten, kaj la apero de la Esperanta eldono de *Tragedio en la Universo*. Ĉio ĉi estas kombinita kun la 20-a datreveno de la morto de Gabrijel Divjanović, kiu instigis tiujn du projektojn, redaktis la revuon *Homo kaj Kosmo* kaj popularigis astronomion inter la esperantistoj en la Zagreba Observatorio dum sia direktorado. La festo de tiuj jubileoj okazos en decembro 2011, antaŭ la Zamenhofa tago en Zagrebo, kunorganizate de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj kaj DEC.

DEC havas sian retpaĝaron en Ipernity, kaj turnas sin al esperantistoj tutmonde, kiuj posedas nebezonatajn Esperantajn materialojn, kun la peto donaci ilin al la DEC-kolekto. Aparta invito iras al eldonistoj, verkistoj kaj redaktoroj, kiuj estas petataj donaci al DEC senpagajn ekzemplerojn de siaj eldonaĵoj, kaj al tiuj kiuj povas komenti la enhavon de la retpaĝaro de DEC kaj kompletigi la tie troviĝantajn informojn.

La prezidanto de DEC estas prof. Zdravko Seleš kaj la sekretariajn taskojn plenumas Josip Pleadin, estrarano de Kroata Esperanto-Ligo pri arkivado. Poŝtadreso: DEC, p.p. 79, HR-48350 Đurđevac, Kroatio. Potencialaj vizitantoj kontaktu nin rete: [dec.kroatio@gmail.com](mailto:dec.kroatio@gmail.com). DEC disponigas ankaŭ loĝadon por vojaĝantaj esperantistoj kaj surloka esplorantoj.

Financan subtenon DEC bonvenigas al siaj kontoj: deoc-f (ĉe Universala Esperanto-Asocio) kaj HR5023600001102158381 ZABAH2X (en Kroatio). Listoj de mon- kaj aliaj donacintoj aperas en la DEC-retpaĝaro: [www.ipernity.com/home/dokumenta.esperanto.centro](http://www.ipernity.com/home/dokumenta.esperanto.centro).

**Davor Grgat**

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 6% por libroj kaj periodaĵoj kaj 19% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe [www.uea.org/katalogo/](http://www.uea.org/katalogo/).

**Aliulo, La.** Sergo Elgo. Paris: SAT, 2011. 218p. 18cm. ISBN 9782918053064. La sesa krimromano de la franca aŭtoro. Atentokapta intrigo, fajna priskribo de la rolantoj, socio-filozofiaj diskutoj. € 12,60

**Cross-Country Skiing around the World.** Hannes Larsson. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2011. 256p. 25cm. Kolorilus. Bind. Kromkovrilo. Anglalingva. ISBN 9788087169285. Finna longdistanca skikuristo (nun loĝanta en Francio) prezentas al ni sian ŝatatan sporton kaj spertojn kiujn li havis praktikante ĝin. Tuta ĉapitro estas dediĉita al Esperanto. € 25,20

**Esperanto-Jugend in der DDR, Die. Zur Praxis und Lebenswelt sozialer Strömungen im Staatssozialismus.** Torsten Bendias. Münster: LIT, 2011. 340p. 24cm. Ilus. Germanlingva. ISBN

9783643112910. Historio de la Esperanto-junularo en GDR (1945-90). € 49,80

**Hejmon havis mi..., La. Kantoj de Mordeĥaj Gebirtig (1877-1942).** Teksto kaj biografiaj notoj: Tomasz Chmielik. La tekstojn de la kantoj en Esperanton trad. M. Bronŝtejn. Bjalistoko: Prymat, 2011. 61p. 24cm. ISBN 9788360368725. Kun 56-minuta KD. Konkiza biografio de juda poeto kaj kantaŭtoro pereinta en la Holokaŭsto. Plejparton de la libro konsistigas la tekstoj (en la jida kaj Esperanto) de la 17 kantoj sur la akompana KD. € 12,00

**Internacieco: la ĉefa eco de la lingvo de Dro Zamenhof.** André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, [2011]. 8p. 21cm. Ĉu la nuna modo "esperantigi" laŭplaĉe proprajn nomojn helpas al la internacieco de Esperanto? € 0,90


**Lao Zi.** Lao Zi. En Esperanton trad. Sugin. 2011. 226p. 21cm.

Dulingva (ĉina, E). ISBN 9787512003675. 81 "ĉapitroj" el *Daode Jin*, verkita de la ĉina filozofo (6-a jc. a.K.). € 12,00

**Malkonfesata klaso, La. Pri la laborista klaso hodiaŭ.** Werner Seppmann. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2011. 176p. 21cm. ISBN 9782918300571. Ĉu oni ankoraŭ povas paroli pri laborista klaso, pri ĝiaj ekzistoj kaj graveco? € 14,10

**Mia vivo kaj Esperanto. Sepdek jaroj da esperantisteco.** André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2011. 52p. 21cm. Ilus. La verkema aŭtoro rivelas kelkajn epizodojn el sia riĉa Esperanta vivo. € 4,50

**Multilingualism. Language, Power, and Knowledge.** M.A. Pinto, A. Sorace, R. Corsetti, W. Jansen, M. Tosco, M.E.B. Giolfo, F.L. Sinatora, G.C. Castorina, D. Astori, M.C. Miduri. Red. kaj Antaŭparolo: Paolo Valore. Pisa: Edistudio, 2011. 173p. 21cm. ISBN 9788870368093. Tekstoj de naŭ prelegoj (ses en la angla




kaj tri en la itala) prezentitaj en kunveno pri plurlingvismo, 24-25 julio 2011. € 21,00

**Planoj de Bruce Partington, La.** Arthur Conan Doyle. El la angla trad. M. Lennartz. Norderstedt: Books on Demand, 2011. 35p. 21cm. ISBN 9783842373174. La fama detektivo Sherlock Holmes helpas solvi krimon, kiu rilatas al la konstruado de brita submarŝipo. € 5,70

**Praktika kulturo de la pensado.** Rudolf Steiner. El la germana trad. W. Nüesch. Berno: La tradukinto, 2011. 16p. 21cm. Teksto laŭ prelego farita en 1909; kun forta antropozofiaodoro. € 2,70

**Sekaino tabibito Hori-san no Esuperanto kimama**





**essee.** Hori Jasuo. Maebaŝi : Horizonte, 2011. 252p. 26cm. Ilus. ISBN 9784939088155. 85 eseetoj japanlingvaj pri diversaj temoj, ĉiuj inspiritaj de per-esperantaj vojaĝoj. € 12,60

**Sen laborista klaso okazas nenio esenca, sed sole kun ĝi, ankaŭ ne / Remalkovro de la klasoj.** Roberto Ŝteigervaldo, Werner Seppmann. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2011. 35p. 21cm. ISBN 9782918300588. Antaŭparolo al germanlingva libro pri klasanalizoj plus la unua eseo en *La malkonfesata klaso*. € 7,50

**Ĵewĝ ilhna tewmin: Dun Karm, Ludvik Lazarus Zamenhof.** Karmenu Mallia. Haĵ-Zabbar: Malta E-Societo, 2011. 23p. 21cm. Maltlingva. Eseo memore al la malta poeto Dun Karm kaj al la unua poeto en Esperanto. € 4,50

## NELIBROJ

**Amindaj.** Amindaj. Donneville: Vinilkosmo, 2011. 40min. Kun tekstobroŝuro. Plonĝu en la kuban muzikon kaj ĝuu 8 pecojn de ensemblo kiu ĉarmis la partoprenantojn de la 95-a UK. KD. € 8,40

**Bonan Damon, Roterdamo! Hungaroj rememoras je la roterdama UK 2008.** Zalaegerszeg: Humana Eŭropo-Asocio. 33min. Filmo pri la 93-a UK kaj serio de fotoj samtemaj. DVD. € 4,20

**Chanajki Klezmer Band.** Białystok, 2009. 39min. Naŭ judaj kantoj el kiuj unu interpretita en Esperanto kaj la ceteraj en la jida. KD. € 12,00

**Duope.** Kajto. Drachten: Windrose Music, 2011. 48min. Kun tekstobroŝuro. Duono de la iama Kajto, kun la helpo de kelkaj gastmuzikistoj, regalas la publikon per sia unua KD en

la nova konsisto. 14 kantoj en la konata stilo. KD. € 9,90

**Esperanto.** Solotronik. Solotronik, 2011. Preskaŭ du horoj da elektronika muziko akompanata de – foje – psikodelaj bildoj. DVD. € 15,00

**Esperanto em método ilustrado.** Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la portugalan trad. I.M.A. Ávila. Martin: La aŭtoro, 2011. ISBN 9788096966776. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por portugallingvanoj en formato pdf, kaj voĉlegitaj tekstoj de la libro en formato MP3. Komputila KD. € 15,00

**Esperanto priamou metódou.** Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. Martin: La aŭtoro, 2011. ISBN 9788096956166. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por slovaklingvanoj en formato pdf, kaj voĉlegitaj tekstoj de la libro en formato MP3. Komputila KD. € 15,00

**Esperanto tríd an Modh Díreach.** Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la irlandan trad. S. Ó Riain. Martin: La aŭtoro, 2011. ISBN 9788089312054. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por irlandlingvanoj en formato pdf, kaj voĉlegitaj tekstoj de la libro en formato MP3. Komputila KD. € 15,00

**Eszperantó egyenesen és közvetlenül.** Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la hungaran trad. I. Szabó. Martin: La aŭtoro, 2011. ISBN 9788089312016. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por hungarlingvanoj en formato pdf, kaj voĉlegitaj tekstoj de la libro en formato MP3. Komputila KD. € 15,00

**IRIS – Esperanto-Festivalo.** Zalaegerszeg: Humana Eŭropo-Asocio, 2007. 15'30". En la hungara kaj Esperanto. Filmo pri la Inter-Regiona

Internacia Semajno, kiu okazis fine de julio 2007 en Zalaegerszeg. DVD. € 4,20

**Monde diplomatique en Esperanto, Le.** MAS, 2011. 8p. 33cm. Ilus. La tria papera eldono de reta gazeto traktanta precipe politikajn temojn. € 2,40

**Revado.** Réverie. DownBridge Publishing, 2011. Du diskoj. Unu en Esperanto, unu en la itala. Ĉiu po 16'45". Po 10 kantoj etno-progresivaj en Esperanto kaj la itala. KD. € 14,10

**Senlima Eŭropo. Sen limoj kun novaj ebloj.** Zalaegerszeg: Humana Eŭropo-Asocio, 2011. 26min. En la hungara kaj Esperanto. Dokumenta filmo pri la aliĝo de Hungario al la Schengen-zono. DVD. € 4,20

**Sun-mobilo – la piramido.** Sven Friis Jørgensen. København: La aŭtoro, 2011. Konstruludo, kies fina rezulto estas piramido kun helico kiu turniĝas baze de la sunenergio. € 7,50

**Tago Baghy, La. En la jubilea jaro 2011.** Societo Julio Baghy kaj Segeda E-Rondo, 2011. Fotoj kaj filmo pri la memortago Julio Baghy 2011. DVD. € 4,20

**Tyokusetuhou de manabu esuperanto nyuumon.** Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la japanan trad. Aoyama Tooru. Martin: La aŭtoro, 2011. ISBN 9788096966769. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por japanlingvanoj en formato pdf, kaj voĉlegitaj tekstoj de la libro en formato MP3. Komputila KD. € 15,00


## Esperanto en prestiĝa libro

**Impona! Pro siaj preskaŭ 450 paĝoj, senriproĉaj bildoj kaj fizika aspekto, Planet Word (Planedo Vorto), kies antaŭparolon verkis la erudicia Stephen Fry, estas certe libro kiun oni povas sentime kaj senhonte donaci.**

Ne nepre al fakuloj pri lingvoj, sed precipe al la granda publiko. La libro, kies aŭtoro estas J. P. Davidson, portas la leganton de la origino de la lingvo ĝis la nuno, kun aldona rigardo al la estonteco.

Al nia lingvo la aŭtoro dediĉas plenan subĉapitron, titolitan "Esperanto: Language and Utopia" (Esperanto: lingvo kaj utopio) (pp. 135-142). La sobran, objektivan tekston akompanas portreto de L. L. Zamenhof kaj bildo de la kovrilo de la Esperanta versio de *La tragedio de Reĝo Lear* (William Shakespeare; trad. K. Kalocsay). Aldone, nia lingvo kaj ĝia iniciatinto menciigās plurloke tra la libro. Mencion ricevas ankaŭ aliaj membroj de la familio Zamenhof kaj, krome, Volapük.

La libro aperis ĉi-jare ĉe Michael Joseph, eldonejo sub la egido de la prestiĝa Penguin Group. Ĝi estas akompanaĵo al la samtitola televidserio de BBC.



## DONACOJ

**Ĝis la 15-a de novembro 2011:**

**Konto Afriko:** Svedio: J. Hammarberg 11,03. *Sumo ĉi-jara:* 6 754,26.

**Fondaĵo Canuto:** Nederlando: A. & H. Bakker 500,00; R. Moerbeek 50,00. *Sumo ĉi-jara:* 6 329,78.

**Libroj por Vjetnamio:** Nederlando:

A. & H. Bakker 500,00. *Sumo ĉi-jara:* 2 180,41.

**Ĝenerala kaso:** Bulgario: V. Gardner 20,00.

Nederlando: S. Hammer 32,26. *Sumo ĉi-jara:* 1 692,52.

*Al ĉiuj koran dankon! UEA*

## Forpasoj

**Jack (John) Casey** (1931-2011), inĝeniero kaj em. universitata lektoro, forpasis la 11-an de aŭgusto en Glasgovo, kie li estis delegito. Dum multaj jaroj li estis kasisto de E-Asocio de Skotlando kaj sekretario de Glasgova E-Societo.

**Miroslav Havránek** (1918-2011), em. konstruĝeniero, mortis la 30-an de aŭgusto en Stupava (Slovakio), kie li estis longe delegito kaj fakdelegito pri skoltismo.

**Rie van der Kooij-Waal** (1920-2011) forpasis la 23-an de oktobro en Hago. Ŝi estis dumviva membro de UEA kaj longe delegito kaj fakdelegito pri oficeja administrado. Dum multaj jaroj ŝi instruis E-on kaj ŝi aparte fieris, ke ŝi esperantigis sian bofilon Gerrit Berveling.

**Brian W.G. Phillips** (1924-2011), radiografiisto, iama delegito kaj fakdelegito pri kvakerismo, mortis en Hastings (Britio).

**Jan Soeteman** (1916-2011), em. instruisto, mortis la 18-an de septembro en Twello (Nederlando). Li estis multjara vicdelegito kaj regula Patrono de TEJO.



**Gvozden Sredić** (1935-2011), trafikekonomiisto kaj multjara fakdelegito pri fervojoj, mortis la 9-an de oktobro en Novi Beograd (Serbio). Li estis sekretario de E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, prezidanto de Jugoslavia E-Ligo kaj de Jugoslavia Asocio de Fervojistaj Esperantistoj, kies organon *Jugoslavia Fervojisto* li redaktis. Krom esti honora membro de Internacia Fervojista E-Federacio, li ricevis oran medalon de FISAIC kaj la medalon "Pro meritoj" de JEL. Li multe verkis kaj prelegis pri fervojfakaj temoj kaj publikigis i.a. lernolibron por fervojistoj (1965; 6 eldonoj), *Interfrigo* (1986), 5-lingvan fervojan terminaron (1988) kaj *Fervojfaka terminologio serba-Eo kaj Eo-serba* (1995).

**Tadokoro Sakutaro** (1927-2011), medicinisto kaj em. rektoro de Gunma-Universitato, mortis la 25-an de septembro en Maebasi (Japanio). Li estis kasisto de Universala Medicina E-Asocio 1999-2008.

## Aldone al la novembra Kalendaro

**15-19 jan 2012:** 47-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj 32-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso en la urbo Taguatinga/Brasília (DF). ✉ <http://taguatek.org.br>; [bel@esperanto.org.br](mailto:bel@esperanto.org.br)

**20-22 apr:** Kunkongreso de la Skota kaj la Britaj Esperanto-Asocioj, en Edinburgo, Skotlando, kun ekskursoplena Postkongreso 23-24 apr. ✉ <http://britakongreso.org>

**22-24 jun:** 10-a kongreso de kroataj esperantistoj en Koprivnica. ✉ DEC, p.p. 79, HR-48350 Đurđevac, Kroatio. ✉ <http://www.ipernity.com/home/213107>; [kroata.kongreso@gmail.com](mailto:kroata.kongreso@gmail.com)

**21-29 jul (korekto!):** Somera Esperanto-Studado – La 5-a renkontiĝo de lernantoj de 'lernu.net' (sed ne nur de ili) en Nitra (90 km de Bratislava), Slovakio. Antaŭtagmeze lernado, posttagmeze ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, vespere amuzado. ✉ [www.lernu.net/ses](http://www.lernu.net/ses); [petro@ikso.net](mailto:petro@ikso.net).

**29 jul - 05 aŭg:** 62-a Kristana kongreso (KELI) en Zöblitz, Germanio. ✉ Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio. ☎ +420 325 615 651. ✉ [polnicky@quick.cz](mailto:polnicky@quick.cz)

## Kongresu kvintage en Edinburgo

La skota ĉefurbo gastigos Kongreson kunorganizatan de Esperanto-Asocioj de Britio kaj de Skotlando de vendredo la 20-a ĝis dimanĉo la 22-a de aprilo 2012 en la historirika urbo. London la 23-an kaj mardon la 24-an okazos postkongresaj ekskursoj al Rosslyn Chapel, La Radego de Falkirk, Glasgovo, Lago Lomond kaj Distilejo Glengoyne. La kongresejo situas apud la ĉefstrato Princes Street. La programo inkluzivas

kontribuojn de la ĉefparolanto István Ertl kaj viziton al la Skota Parlamentejo, gvidatan de esperantista dungito. Kontraŭ kotizo de 60€ oni ricevos la programon, bufedon, leĝerajn lunĉojn kaj trinkpaŭzojn kun kukoj. La postkongreso kostas 70€ (se pagita antaŭ 2012-01-31). Ĝi ebligas vojaĝi en Skotlando ene de kelkaj tagoj sen devi aranĝi mem veturadon kaj liston de vizitindaĵoj. Edinburgo atingeblas de loka flughaveno nur 5 km for de la kongresejo. Ne maltrafu la okazon! Plenaj detaloj kaj aliĝilo haveblas ĉe *britakongreso.org*.

# Esperanto denove en Ekonomia Forumo



## Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) sukcese partoprenis jam la sesan fojon en la 21-a Ekonomia Forumo en Krynica, Pollando.

Ĉi-jare ĝi allogis ĉ. 2 600 partoprenantojn, inter kiuj estis pintaj ŝtataj kaj politikaj reprezentantoj, estroj de entreprenoj, asocioj, akademiaj rondoj ktp. Aliĝis ĉ. 500 ĵurnalistoj. La ĉeftemo estis “Eŭropa dilemo: partnereco aŭ rivalado?” Okazis 7 plenkunsidoj kaj 150 diskutpaneloj. Dum la vizito de Donald Tusk, ĉefministro de Pollando, Halina Komar sukcesis paroli kun li kaj informi lin pri Esperanto. Li sciis pri la ekzisto de Esperanto en Sopot (lia loĝloko) kaj eĉ menciis tian E-monumenton.

En Krynica reprezentis EEU Halina Komar (PL), Arkadiusz Zychewicz (PL), Peter Baláž kaj Jozef Reinvar (SK). Agnieszka Mozer kaj Dorota Rodzianko (PL) okupiĝis pri la informa stando de EEU. Danke al personaj kontaktoj de Halina Komar kun la ĉeforganizanto de la forumo, Esperanto kaj EEU estis bone videblaj, ĉar ĝia stando estis en la ĉefa konstruaĵo, kie okazis plenkunsidoj, kaj partoprenantoj ne povis preteriri nevidante grandan afiŝon de Esperanto kaj informojn pri ĝi. La membroj de la EEU-teamo informis preterirantojn ĉe la stando, dum

diskutpaneloj kaj personaj debatoj, disdonis informmaterialojn pri Esperanto kaj diskutis pri la antaŭenigo de plurlingveco kaj la eblo solvi lingvajn problemojn. La tuta ĉeesto de EEU estis kunfinancita de EEU kaj UEA, sen kies subteno malfacilus la ĉeesto.

Jozef Reinvar partoprenis en la diskutpanelo “Demokratio en Eŭropo”, en kiu li prezentis la temon “Civitana socia platformo de EU: civitanoj kontribuas al lingva demokratio”. Enkonduke li akcentis, ke lingva egalrajteco estas la fundamento de demokratio, kaj informis pri la rekomendoj de 29 neregistaraj organizaĵoj (inter kiuj estis EEU), elirantaj de la Traktato de Lisbono kaj la Ĉarto de Fundamentaj Rajtoj. Peter Baláž aktive partoprenis en la diskutpanelo “Forto de homoj, interreto kaj la ŝanĝiĝanta mapo de la mondo”, en kiu oni diskutis pri la forto kaj influo de interretaj informoj al la homoj.

La membroj de la EEU-teamo partoprenis la Forumon de la Tria Aŭgusto, jam la trian fojon organizitan kadre de la Ekonomia Forumo en Nowy Sącz. Tie Jozef Reinvar informis la ĉeestantojn pri la rekomendoj de la Civitana Socia Platformo por Plurlingvismo kun akcento al la lernfaciliga rolo de Esperanto en lingvo-instruado kaj pri la projekto Lingvolancilo.

En la kultura parto de la foruma programo la grupo de junaj kantistinoj de Nowy Sącz prezentis kun granda sukceso la koncerton “Vento el Montaro”, kiu en la unua parto prezentis en Esperanto polajn popolkantojn kaj en la dua parto montris, ke esperantistoj subtenas la vastan plurlingvecon de Eŭropo, kantante famajn kantojn en pluraj lingvoj. La spektantaro estis informita, ke tiamaniere estas prezentata la riĉa multkultureco de Eŭropo, kiun ĝuste Esperanto povas savi kiel neŭtrala pontolingvo.

La ĉi-jara partopreno en la Ekonomia Forumo estis sukcesa kaj rekomendindas ĉeesti ankaŭ venontjare. Tiu ĉi aranĝo estas eminenta eblo por prezenti al ekstermovadanoj la ideojn kaj rekomendojn de EEU, stimuli tuteŭropan diskuton pri subteno al vasta plurlingvismo, prezenti la rolon de Esperanto en la egalrajtigo de ĉiuj lingvoj kaj demokratiigo de la lingva kaj kultura politiko en Eŭropo.

**Jozef Reinvar kaj Peter Baláž**

EEU-aktivuloj, partoprenintoj de la Ekonomia Forumo

## La 11-a de septembro en Adelajdo

Tiu ĉi mondo memorata tago iĝis por la aŭstraliaj esperantistoj tago de sukceso. Post du jaroj da preparoj estis oficiale malfermita ekspozicio pri Esperanto en la Migra Muzeo de Adelajdo. Ĝi donas larĝan vidon al la temo “Esperanto: antaŭenigo de ĉies lingvo” per prezento de la monda kaj aŭstralia historioj de Esperanto, la atingoj, uzado, argumentoj kontraŭ kaj por mallonga gramatiko ĝis la elstaraj personecoj de la kontinento mem. Kongrue al la celoj de la muzeo unu afiŝo estas dediĉita al la sudaŭstraliaj enmigrintoj-esperantistoj. Konstante prezentata estas la nova dokumenta filmo de Sam Green: *The Universal Language*. La ekspozicion, viziteblan dum 3 monatoj, malfermis Ghil'ad Zuckermann, profesoro pri lingvistiko kaj endanĝerigitaj lingvoj de la Universitato de Adelajdo. **Katja Steele**



**Trevor Steele en la malferma ceremonio en Adelajdo.**  
Vidu ankaŭ <http://zomobo.net/play.php?id=4MV1cEOh3a4>



- A** bontarifoj 238  
Adelajdo 236, 260  
Afriko 136, 206  
Ahlstedt, M. 166  
Ahomäki, J. 199  
Aitai, D. 166  
Akademio de Esperanto 178, 187  
Allée, B. 90  
Alta 220  
Altieri, R. 20  
Ameriko 104, 136, 206  
Amery, H. 90  
Amikeco trans limoj 27  
Amoureux, J. 33, 57, 105  
Anoncetoj 91, 214  
Antanaitis, A. 245  
Arabaj landoj 137  
Arquillos, A. 42  
Auld, W. 64, 124  
Aŭkcio 181  
Aŭstralio 236, 260  
Aŭstrio 58, 131, 148  
Azio 137, 206
- B** aehr, P. 16  
Bagó, S. 108  
Baláz, P. 123, 224, 260  
Barandowska-Frank, V. 11  
Baranova, J. 63  
Barros, N. 42  
Batrakova, J. 134  
Bednarczyk, R. 160  
Belartaj Konkursoj 132, 182, 183, 238  
Benino 136  
Berlino 94  
Berveling, G. 159  
Bibliotekoj 19, 133, 163, 253  
Bilanco 141  
Biro-Walker, D. 214  
Blahuš, M. 9, 10, 11, 34, 66, 90, 107, 114, 205, 212  
Blanke, D. 11, 90, 198  
Blanke, W. 182  
Blinduloj 229  
Blonstein, N. 32  
Böhnke, K. 214  
Bokova, I. 173  
Bork, E. 166  
Borsboom, E. 88  
Bosnio kaj Hercegovino 45  
Boulton, M. 90
- Brazilo 42, 70, 104, 115, 236  
Brent, E. 166  
Brazilo 70, 116  
Britio 151  
Bronštejn, M. 15, 158, 254  
Bulgario 70  
Buller, O. 129, 147, 177, 243  
Bulonjo 33, 246  
Burundo 19, 165  
Bussing, G. 94  
Bute, A. 151
- C** alógero, R.G. 166  
Camacho, J. 90  
Campos Pacheco, J. 112  
Caragea, N. 110, 208  
Carol, L. 37, 39, 86, 207  
Cartwright, S. 90  
Casini, B. 124  
Casper, A. 180  
Casquero, A. 41, 109, 199  
Centra Oficejo 19, 46, 91, 115, 199, 248, 253  
Cestac, F. 32  
Charrière, A. 200, 201  
Charters, D. 134  
Chatterjee, B. 176  
Cherpillod, A. 255  
Childs-Mee, A. 90  
Chomsky, N. 90  
Cink, J. 166  
Coelho, P. 51  
Conde, X. 224  
Corsetti, R. 18, 90, 178, 198, 199, 219  
Couturat, L. 33  
Cramer, M. 102, 243
- Ĉ** ehio 145, 157  
Ĉerjomin, R. 31  
Ĉinio 41, 217, 219
- D** aishin, N. 44  
Danio 1, 4, 25, 49, 52, 249  
Dasgupta, M. 166  
Dasgupta, P. 3, 51, 70, 90, 99, 127, 141, 172, 177, 186, 196, 231  
Dastyh, M.D. 22  
Delaire, P. 207  
de' Giorgi, A. 124  
de Zillah, M. 63
- del Barrio, T. 114  
Degèssys, G. 63  
Delaire, P. 207  
Demmendaal, B. 208  
Demmendaal, L. 129, 181, 195, 206, 208, 232  
Derks, J. 249  
Despiney, B. 243  
Desplantes, M. 212  
Dey, C.L. 214  
Diaz Bautista, J.D. 212  
Diskoj, DVD 247  
Ditacroute, F. 214  
Divall, N.H. 166  
Dobrzyński, R. 13  
Dokumenta Esperanto-Centro 256  
Dumain, R. 32
- E** @I 10, 123, 190  
Eco, U. 114  
Ederveen, D. 8  
Edinburgo 259  
edukado.net 19, 135  
Edvardsen, M. 232  
Edvardsen, T.M. 232  
Einstein, A. 51  
Ekonomia Forumo 260  
Ekspozicioj 44, 93, 116  
Eksteraj rilatoj 131  
Ekzamenoj 34, 134, 165, 190  
El nia historio 33, 57  
Ertl, I. 90  
'Esperanto 125' 77  
Esperanto.com 7, 184  
Esploro kaj dokumentado 139  
Estrara raporto 127  
Estraro de UEA 127, 128, 181  
Eŭropa Esperanto-Unio 103, 252, 260  
Eŭropa Unio 132  
Eŭropo 132, 137, 206
- F** aka agado 138, 179  
Fantom, H. 201  
Fares, G. 39  
Fenger, P. 173  
Fervojistoj, IFEF 79, 145, 157  
Fettes, M. 174  
Figiera, G.C. 90  
Financoj, administrado 129, 232, 238
- Fischer-Kotowski, P. 75, 253  
Flores, A. 85  
Fondadoj 19  
Forpasoj 22, 70, 94, 118, 166, 214, 238, 259  
Francio 31, 42, 92, 150  
Frangeul, A. 22  
Frank, H. 199  
Friis, L. 5
- G** abalda, F. 56, 157  
Gabalda, L. 157  
Gacond, C. 115, 142, 205  
Garcias Santos, A.A. 149  
Gaus, E. 123  
Gazetara Kampanjo 6, 184  
Gbadamasi, L. 136, 173  
Geremek, B. 225  
Germanio 11, 18, 28, 29, 31, 93, 94  
Ghimire, B. 41  
Gilbert, F.X. 199  
Goes, H. 186  
Gordenker, L. 16  
Gorecka, H. 115  
Gosciny & Uderzo 90  
Grattapaglia, U. 116  
Green, S. 32  
Grejzono 31, 149, 223  
Grgat, D. 256  
Grosjean, M. 80, 90, 106, 165, 180, 199, 205  
Grundtvig-programo 21  
Grzębowski, A. 199  
Gubbins, P. 39  
Gutiérrez González, M. 104, 136, 222  
Gutiérrez Perera, D.D. 112
- Ĝ** enevo 131
- H** ajnano 217, 219  
Hammer, J.K. 166  
Hanojo 109, 220, 222, 244  
Harnyos, F. 181  
Hauge, P. 86  
Hauge, S. 19, 39, 86
- Hausser, P. 31, 177, 189  
Havano 116, 132  
Hengstmengel-Koopmans, B. 201  
Henriksen, K. (Kimo) 188, 190, 199  
Henrique, F. 237  
Hernández, J. 130, 224  
Himalajo 94  
Hinker, G. 8  
Hispanio 42, 114  
Hjelslev, L. 99  
Høg, E. 179  
Hochól, S. 214  
Holevič, N. 214  
Holokaŭsto 165  
Honoraj membroj 198  
Hori, J. 101, 186, 198  
Hruška, M. 212  
Huetting, I. 151  
Hug, S. 212  
Hungario 108  
Huurman, N. 243
- Ĥ** odin, V. 44
- I** lf, I. 110  
Indonezio 41  
Infanoj, IIK 31, 142, 188, 190, 193, 200, 201  
Informado 6, 130  
Instruado, ILEI 73, 76, 97, 133, 149, 165, 176, 180, 224  
Interlingvistiko 11, 68, 251  
Internacia Kongresa Universitato 56, 179, 235  
Interreto 9, 34, 66, 90, 107, 134, 147, 148, 184, 205  
Intervjuo 75, 171, 245  
Irano 42  
Irlando 252  
Isaev, M.I. 214  
Israelo 69, 117, 165  
Italio 20, 212
- J** acobsen, J. 200  
Jaderstrom, R. 88  
Japanio 8, 42, 44, 93, 100  
Jensenius, B. 159  
Jermáf, J. 22  
JJMarino 189  
Johansson, S. 15
- jOmO 188  
Jørgensen, M.G. 166  
Junularo, TEJO, IJK 8, 9, 55, 108, 109, 126, 135, 185, 223, 243, 248
- Ĵ** urnalistoj, TEĴA 245
- K** adar, A. 31  
KAEST 10  
Kalendaro 59, 153, 227, 259  
Keefe, D. 106  
Keetlaer, R. 255  
Kehlet, E. 35  
Kehlet, T. 5  
Keller, S. 131, 177, 204  
Kerbel, A. 110  
Kido, F. 166  
Kievo 185, 223  
Kiselman, Ch. 90  
Klobučar, A. 208  
Klobučar, D. 208  
Knichal, O. 114  
Kniivilä, K. 14, 158  
Kobayashi, T. 22  
Kolker, B. 90, 159  
Kolker, D. 166  
Komar, H. 21, 152  
Komarnicka, M. 134  
Komitato de UEA 128, 177, 249  
Konferencoj 10, 11, 76, 176  
Kongresa Kalejdoskopo 180  
Kongresa Komunikilo 52, 244  
Kongresa Panoramo 188  
Kongresa rezolucio 175  
Kongresa temo 53, 102, 126, 175  
Kongresoj 1, 3, 5, 8, 22, 46, 81, 104, 117, 129, 150, 151, 152, 164, 169, 171-190, 196-199, 212, 225, 236, 244  
Konisi, G. 87  
Konkursoj 21, 70  
Kontakto 9  
Koopmans, P. 166  
Kopenhago 73, 76,

81, 97, 99, 105, 169, 195, 234  
 Koreio 29  
 Korjenkov, A. 90  
 Kóródy, Z. 134  
 Kosiarska, G. 54, 78, 229  
 Kotiztabelo UEA 40, 211  
 Koutny, I. 68, 251  
 Kovács, M. 90, 224  
 Kováts, K. 34, 68, 88, 90, 149  
 Kožuchová, P. 135  
 Kroatio 117, 164, 256  
 Krombeen, D. 166  
 Książek, J. 214  
 Kubo 116  
 Kulturo 132  
 Künzli, A. 86, 230, 254  
 Kursoj 29, 34, 77, 85, 92, 94, 109, 123, 133, 135, 149, 152, 165, 206, 219, 223, 224  
 Kurucz, G. 199

**L**a Torre, M. 90  
 Lafont, P. 214  
 Lagrange, G. 124  
 Landa agado 136, 222  
 Lang, S. 159  
 Lapenna, B. 81  
 Lapenna, I. 51  
 Larsen, J.S. 4  
 Larsson, H. 250  
 Laste Aperis 17, 36, 65, 89, 113, 160, 209, 233, 257  
 Le Monde 42  
 Leclercq, J.-M. vd. jOmO  
 Lee, J. 29  
 Leev, M. 214  
 Lencki, K. 166  
 lernu.net 123  
 Leterkesto 35, 81, 105, 225, 249  
 Libroj (recenzoj)  
*100 Zamenhofaj proverboj* 110  
*Avo Paŭlo/Opa Pablo/Grand Pa/Dziadek Paweł* 86  
*Bonvenon en nia mondo* 159  
*Dek du seĝoj* 110  
*Desegnu la parkon/Desegnante la parkon/Desegnante en parko* 112  
*Doktoro Esperanto* 39  
*Edzino de Kuracisto Hanaoka Seisyy,*

*La 87*  
*Esperanto kaj vivo* 230  
*Eta Princo, La 207*  
*Infana raso, La 64*  
*Konversacia vortaro* 88  
*Lecionoj por knabo* 15  
*Legendoj pri SEJM* 254  
*L.L. Zamenhof (1859-1917): Esperanto, Hillelismus (Homaranismus) und die "jüdische Frage" in Ost- und Westeuropa* 86  
*Logi en homaj lingvoj* 231  
*Marvirinstrato* 37  
*Nun mi pripensos 14*  
*Ora bovido* 110  
*Planet Word* 258  
*Proverbaro tutmonda* 255  
*Rakontoj sub la lito* 208  
*Rusa-Esperanta biblia frazaro* 14  
*Saĝo kiel terapio – Ĵsmintis kaip terapija* 63  
*Sciencisto, esperantisto, patro: Eŭgeno Bokarjov* 38  
*Talpočasisto, La* 159  
*Transilvania nupto, La* 159  
*Tri nigraj ŝipoj* 39  
*Urbo Goblinsk* 158  
 Librofoiro 116  
 Libroservo UEA 90, 234, 246  
 Lingvaj rajtoj 176  
 Lingvistiko 84  
 Lins, U. 86, 90  
 Lipari, M. 14, 20, 187  
 LoJacomio, F. 31, 149  
 Loke-fake-persone 19, 114  
 Lowenstein, A. 110  
 Luez, D. 70  
 Luin, U. 151  
**M**acAoidh, G. 64  
 MacGill, S. 35, 77, 134, 176, 180  
 Magalhães, C. 187  
 Maitzen, O. 22  
 Malferma Tago 19, 46, 91, 115, 199  
 Malferme 3, 27, 51, 75, 99, 123, 147, 171, 195, 219, 243

Mallia, C. 20, 199  
 Malto 20  
 Manandhar, R. 94  
 Mannewitz, C. 11  
 Marček, S. 90, 128, 172, 224  
 Martin, G. 150  
 Máté, N.K. 166  
 Mathyas, U. 82  
 Maurelli, F. 197, 213  
 Mayer, H. 58  
 McCoy, R. 187  
 Med, N. 22  
 Medrano, E.M. 105  
 Membraro de UEA 118  
 Mendonça, A. 22  
 Migliucci, M. 39  
 Miyoshi, E. 42, 43, 93, 225  
 Moerbeek, R. 16, 35, 106, 198, 204, 229  
 Moirand, D. 92  
 Monda Socia Forumo 80  
 Montesinos, A. 134  
 Moon, B. 178, 187  
 Morankić, V. 117  
 Morariu, T. 151  
 Mota, R.M. 166  
 Movada Foiro 173, 187  
 Mueller, J. 185  
 Murr, S. 8, 9  
 Muzeoj 58, 133, 148  
**N**ASK 45, 139, 149  
 Navige tra TTT-paĝoj 9, 34, 66, 90, 107, 205  
 Neergaard, P. 5  
 Nederlando 70  
 Nemere-Czachowska, K. 160  
 Nepalo 41  
 Nervi, M. 19  
 Nguyen, X.T. 42  
 Nicolodi, C. 166  
 Nishimura, N. 166  
 Noe, J. 243  
 Nosková, K. 10, 11  
 Nourmont, C. 28, 129, 132, 133, 150, 177  
 Novjara mesaĝo 3  
 Novjara Renkontiĝo 31  
 Novjorko 32, 131  
 NROj 243  
**O**Riain, S. 103, 252  
 Oceanio 138, 206  
 Oficiala Informilo 16, 40, 67, 91, 115, 163, 211, 235, 259  
 Onet, I. 112, 159, 190

Oostendorp, M. van 231  
 Oratora Konkurso 142, 183  
 Oriento 206  
 Osincev, A. 238  
 Otira, D. 90  
**P**anteono 19  
 Parizo 131  
 Partizanske 212  
 Pasporta Servo 8  
 Pelé 51  
 Pentus, A. 111  
 Pentus, M. 111  
 Petrov, E. 110  
 Petrović, R. 134, 176, 224  
 Pietrzak, B. 6, 27, 54, 130, 187, 232, 249  
 Pietuchowska, N. 224  
 Pileckienė, D. 224  
 Pilger, W. 90  
 Pilipović, S. 133  
 Piron, C. 51, 90  
 Pleadin, J. 164, 256  
 Pola Radio 54  
 Polák, Z. 22  
 Pollando 21, 55, 68, 152, 160, 251, 260  
 Poór, V. 243  
 Poštmarkoj 208  
 Poznano 251  
 Premioj:  
 – Deguči 198  
 – FAME 254  
 – Zamenhof 20  
 Procopio, C. 14  
 Prytz, O. 83  
**Q**uednau, D. 56  
 Quéré, G. 149  
**R**adio(fonio) 54, 70, 78, 229  
 Rask, R. 84  
 Rasku, E. 166  
 Reagoj 18  
 Recenzoj 14, 37, 63, 86, 110, 158, 207, 230  
 Regionaj komisionoj de UEA 206, 222  
 Reinvart, J. 260  
 Resende, R. 70  
 Resulović, M. 166  
 Ricci, G. 160  
 Rodrigues (Hernández), M. 112  
 Rojas, A. 42  
 Ronco, M. 29, 135  
 Rotarianoj 69  
 Ruig, K. 70  
 Rumanio 150

**S**adan, T. 226  
 Saint-Exupéry, A. 207  
 Samodaj, V. 230  
 São Paulo 236  
 Sayadpour, K. 42  
 Schaedel, A. 166  
 Schleicher, I. 166  
 Schmid, H. 166  
 Schor, E. 32  
 Schröder, I. 172  
 Schubert, A. 189  
 Schumann, B. 223  
 Scienca agado 10, 138, 197  
 Sekelj, T. 124, 235  
 Schor, E. 32  
 Semajno de Internacia Amikeco 57  
 Seminarioj 30, 55, 93  
 Senegalio 80  
 Shlafer, A. 36  
 Sicilio 19  
 Simon, K.-H. 166  
 Simpozio 32, 251  
 Sinha, L. 3  
 Skoltoj 55, 160  
 Skotlando 259  
 Slovakio 10, 121, 212, 224  
 Smidéliusz, B. 108  
 Smideliusz, P. 224  
 Somera Esperanto-Studado 121, 123, 224  
 Soros, G. 32  
 Soros, J. 32  
 Soros, T. 32  
 Spezokonto 140  
 Steele, K. 203, 236  
 Steele, T. 90, 203  
 Stockholm 151  
 Strategia Forumo 174  
 Strategia komisiono 195  
 Striganova, A. 6, 7, 184  
 Studer, H.E. 166  
 Subvencioj:  
 – Cigno 198  
 Svane, E. 106  
 Svedio 151  
 Svensson, M. 22  
 Svislando 142, 205  
 Syôzi, K. 42  
**Ŝ**evchenko, A. 18  
 Ševchenko, D. 6, 7, 14, 184  
**T**agore, R. 3  
 Tajvano, 41  
 Teatro 93, 187  
 Tellier, A. 14  
 Terminologia forumo 142

Thanh, H. 220  
 Thorsen, P. 7, 163  
 Thorsen, R. 7, 163  
 Thuro, K. 35  
 Tomíšek, J. 79  
 Tonkin, H. 32, 90, 139, 171, 182, 202, 204  
 Torino 212  
 Triolle, R. 149, 243  
 Trockmann, N. 39  
 Tuinder, J. 214, 229  
 Tyrin, S.-M. 248  
**U**krainio 44, 93, 185  
 UEA 46, 238, 243  
 Umeda, Y. 22  
 Unesko 173, 204, 243  
 Universitatoj 11, 68, 219, 251  
 Unuiĝintaj Nacioj 15, 46, 131, 202, 243  
 Usono 32, 45, 131, 139  
**V**arsovio 55  
 Venezuelo 114  
 Verda Petalo 220  
 Vergara, J.A. 53, 75, 82, 102, 126, 175  
 Vessella, N. 14  
 Vestover, T. 37  
 Villanueva, U. 166  
 Vi trovos... 2, 26, 50, 74, 98, 122, 146, 170, 194, 218, 266  
 Vieno 131, 148  
 Vikipedio 138,  
 Vjetnamio 30, 42, 181, 220  
 Vollersten-Diewerge, M. 39, 86  
 Vrhovac, M. 45, 133  
 Vu, D.T. 220  
**W**alters, R. 166  
 Wandel, A. 56, 69, 114, 117, 138, 139, 165, 179, 189  
 Wedel, E. 39  
 Wells, J.C. 90  
 Wennergren, B. 90  
 Westermayer, M. 243  
 Westover, T. 37  
 Wunsch-Rolshoven, L. 31  
**Z**acho, K. 5  
 Zaleski-Zamenhof, L.C. 12, 173  
 Zajdman, J. 94, 223  
 Zamenhofa Tago 41  
 Zamorij, S. 44  
 Żebrowski, Ł. 54

## LEGOLIBRO EL KANADO

**LITO APUD LA FENESTRO.**  
**Betty Salt (1907-1994).**  
**Rotterdam: UEA, 1999.**  
**108p. 21cm. Prezo: €4,80.**

Simplaj rakontoj, teatraĵetoj kaj poemoj, kun kelkaj tradukoj el la kanada literaturo. Stile belaj, ili facile kaptas ankaŭ la malpli spertan leganton, dank' al relative facila lingvaĵo. Ankaŭ pro la mallongeco de la plej multaj tekstoj la libro bone taŭgas kiel progresiga legaĵo.



En 2010 139 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

## Societo Zamenhof


Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK, kaj specialan donaceton. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



## PRAGA MANIFESTO PROFUNDE

**KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS.** Red. O. Buller kaj R. Corsetti. Rotterdam: UEA, 1999. ISBN 9290170611. 24p. 30cm. Prezo: €4,50.

Studkajero pri la temoj de la Manifesto de Prago: demokratio, transnacia edukado, pedagogia efikeco de Esperanto, plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj homa emancipiĝo.



## Venontjare al Hanojo!

Glumarkoj (4x3cm) por la venontjara UK haveblas ĉe la Libroservo de UEA. 10-peca folio kostas €1,20. Triona rabato ekde 3 folioj.

**La periodaĵoj de UEA kaj TEJO bonvenigas ankaŭ vin kiel sian leganton en 2012!**

# Esperanto

11 numeroj jare, kun po 24 paĝoj numere.  
 € 38,00\*

# KONTAKTO

6 numeroj jare, kun po 24 paĝoj numere.  
 € 23,00\*

\*La prezoj varias laŭlande. Konsultu la kotiztabelon de UEA.  
 Abonu rekte de UEA, aŭ pere de via landa peranto.

## Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and Documentation on World Language Problems

**La problemoj. La solvoj.**  
**La rolo de planado**  
**en la homa komunikado.**  
**Kaj la kontribuo de Esperanto.**

Redaktoroj:  
 Probal Dasgupta, Humphrey Tonkin.  
 Recenzoredaktoroj:  
 Frank Nuessel, Federico Gobbo.  
 Interlingvistika redaktoro: Mark Fettes.  
 Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 36224,  
 NL-1020 ME Amsterdam, Nederlando.  
 Aperas trifoje jare.  
 Individua abono: 70,00 eŭroj.  
 Institucia abono: 214,00 eŭroj.  
 Abonu pere de la Libroservo de UEA.




# FURORAĴOJ

de la  
eldona fako  
de UEA


## KLASIKA VOJAĜLIBRO

**LA LIBRO DE LA MIRINDAĴOJ AŬ LA PRISKRIBO DE LA MONDO.**  
**Marko Polo (1225-1324). Esperantigis Daniel Moirand.**  
**Rotterdam: UEA, 2001. 445p. 21cm. ISBN 9290170751.**  
**Ilus. Serio "Oriento-Okcidento", n-ro 34. Prezo: €15,00.**

Antaŭ 700 jaroj Marko Polo vojaĝadis vaste de Zanzibaro ĝis Ĉinio, landoj plenaj de mirindaĵoj por tiutempa eŭropano. Liaj spertoj restis influa fonto de informoj kaj inspiro tra jarcentoj. Per sia verko Marko Polo kreis ponton inter du kultursferoj de la tiam mondo. Ĝia Esperanto-versio, en verva traduko kaj klera prizorgo de Daniel Moirand, trovis naturan lokon en la serio "Oriento-Okcidento".



## REMEMOROJ PRI HOLOKAŬSTO



**MASKERADO ĈIRKAŬ LA MORTO.**  
**Nazimondo en Hungarujo (1965).**  
**Tivadar Soros (1894-1968).**  
**Redakto kaj komentario de**  
**H. Tonkin. Rotterdam: UEA,**  
**2001 (2-a eld.). 318p. 21cm.**  
**ISBN 9290170735. Prezo: €15,00.**

La rememoroj de T. Soros pri la holokaŭsto en Budapeŝto, estis en 1965 verko "kulture vere trarompa, ne simple io nova en Esperanto, sed io nova entute" (H. Tonkin). Jena dua eldono havas ampleksan komenton kaj detalan indkson.

## VIA UNUA VORTARO

**BAZA ESPERANTA RADIKARO.**  
**Wouter F. Pilger.**  
**Rotterdam: UEA, 2010**  
**(2-a eld.). 169p. 18cm. ISBN**  
**9789290171089. Prezo: €7,50.**

Bonega unua vortaro por studento de Esperanto, kvazaŭ miniatura PIV, per kies uzado oni lernas ne nur vortojn sed ankaŭ ekpensas en Esperanto. Pli ol 2900 radikoj klarigitaj per oftaj kaj kutimaj vortoj, kaj kun indiko pri iliaj ofteco kaj utileco.



## KAJ PLIE...

**LA TREZORO.** Kolektis Hussain M. Al-Amily. Redaktis G. Berveling, M. Cayley, R. Corsetti. Kolekto de 3 000 proverboj kaj anekdotoj el la araba kaj islama kulturo; kun klarigaj notoj. Rotterdam: Araba Komisiono de UEA, 2008. 137p. 24cm. Ilus. ISBN 9789290171010. Prezo: €15,00.

**TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.**

**Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando**  
**Telefono: +31 10 436 1044 Telefakso: +31 10 436 1751 Retpoŝto: libroservo@co.uea.org**